Nous avons besoin de vous, de vos dons. Vous avez maintenant une idée précise de notre action. RE a créé deux emplois, en CDI. Ces deux personnes passent leurs journées de travail à faire passer le message. **Si comme nous, vous pensez qu'il faut vraiment que les choses avancent, si vous voulez que l'espéranto sorte de son anonymat, si vous voulez contribuer à ce que l'Europe qui se construit puisse vraiment devenir l'Europe des citoyens, alors aidez-nous. Adressez-nous vos dons.** Nous en avons besoin. Il ne sert à rien d'attendre les décisions politiques. Elles viendront un jour, oui, mais seulement quand la population sera bien informée et qu'elle réclamera par des groupes de pression que l'espéranto rentre dans les écoles. Nous en sommes loin, très loin. Et personne d'autre que les espérantistes n'amorcera le processus. R.E, pour sa part y contribue fortement avec d'autres en France, mais qui ont choisi des voies différentes.

Nur kune ni sukcesos. Ce n'est que tous ensemble que nous réussirons.

Comme chaque année notre **Assemblée générale** se tiendra dans les locaux de l'Association Passerelles, 26 rue Enclos-Fermaud (à 300 mètres de la gare SNCF) **le samedi 8 novembre 2003 à 14h30 précises.** Vous y êtes cordialement invités.


À Montpellier, le 3 septembre 2003,

La Présidente




Josette Guardia

Le Trésorier




Patrice Brandy

Le Secrétaire



Jean-Michel Parisot-Delourmel

Le Directeur



Thierry Saladin



... alparolas nin nia prezidantino ...

Jen lasta ekzemplero de via "LA INFORMILO" rilate 2003. Mi esperas, ke vi ĉiuj daŭre ŝatas la enhavon, prezentadon, ktp. Mi dankas Pol Denis tion rilate. Se vi havas proponojn por fari, ne hezitu kontakti vian komitaton.

Vi legos raporton pri la deĵorado de *Espéranto-France-Est*. Mi dankas la komitatanojn por belega kaj gravega laborado.

Tamen mi lanĉas alvokon. Venontan jaron okazos printempa staĝo, en Verduno (kie la asocio *Espéranto-Meuse* jam faris ekspozicion pri la *Homaj Rajtoj kaj UNESKO*... Dankon por la sukceso!). Ni profitos la okazon organizi la *Jaran Membrokunvenon* ("ĝenerala asembleo", se vi preferas) samtempe. Provu do rezervi 1 aŭ 2 horojn pliajn fine de via staĝo por ĉeesti tiun asembleon. Gravus por la vivo de via asocio:

- kion atendas vi de via komitato, de via asocio (servojn kompreneble, sed kiamaniere, laŭ kiaj kriterioj...)
- ekzistas diversaj manieroj agadi, kaj diversaj celoj por atingi, pere de esperanto, agadante solaj aŭ kun aliaj asocioj (esperantaj aŭ ne)...

Ni atendas viajn proponojn!

Dua punkto rilate la asocian vivon: restas lokoj en la komitato!!! Se vi deziras agi, proponi, venu: iĝu voĉo por via klubo ekzemple, ĉar ĉiuj kluboj havas ideojn. Nia federacio havas grandan ŝancon tion rilate: ni agas diversflanke, diverscele, senprobleme (esperas mi!). Sed eblas pli fortigi 1 (unu!) trafan agadon de tempo al tempo. Tiucele povas helpi via komitato...

Tria punkto: ĉi-jaro mi preskaŭ nur zorgis pri administrativaj taskoj. Mi devis administrative batali kun ministerio por konservi la tielnomatan *CPPAP* rilate *LA INFORMILON*, por ke vi ricevu ĝin laŭ malalta prezo. Mi esperas, ke vi senkulpigis mian silenton (kvankam mi konservis kontaktojn kun kelkaj asocioj). Pro tio mi vere dankas nian komitaton, kiu bonege deĵoris kadre de la deciditajn punktojn de la lasta Ĝenerala Asembleo.

Mi konsentis esti prezidantino de E-F-E post la foriro de François-Xavier GILBERT ĝis unu alia estu preta... Mi esperas, ke iu estas preta por repreni la torĉon printempe! Vi ja komprenas, kiom malfacile por mi estis: vojaĝi por mia laboro, zorgi pri mia familio kaj deĵori je tiu posteno!!! Despli ĉi-jare: mi reenskribiĝis ĉe la Universitato, laboras kiam eblas, studas kaj provas esti atentema pri nia asocio... En majo mi trapasos gravan ekzamenon, kaj poste deĵoros por Pariza Kultura Organizado samtempe deĵorante kun diversaj turismoficejoj. Do mi daŭre estos for, eĉ alilanden...


Mi intencas resti en la komitato, sed por mi ne plu eblas reprezenti la asocion, tio estas alia rolo de prezidanto. Mi profitas danki Armand HUBERT, kiu agis min rilate, ne nur kiel memoro, sed ankaŭ kiel humanisto, kaj eĉ pro san-problemoj daŭre tre atente zorgas pri via asocio. Kompreneble, ankaŭ André GROSSMANN grave rolas: sen mono, asocio ne ekzistas. Do sen kasisto ne eblas plueniri. Prezidanto ne havas eblecon deĵori sen bonegaj sekretario kaj kasisto.

Mi alvokas ankaŭ pro aparta deĵorado, prizorgata de Jacques HERLE: *Fontenoy-la-Joûte* (la tielnomata "vilaĝo de la libroj"). Se vi deziras travivi alispecan tagon proponu al li vian helpon por la venonta jaro: vi malkovros interesan kaj mirindan vilaĝon.

Mi antaŭ ĝojas revidi vin en Verduno, ni kune malkovros la urbon, la katedralon kaj la *Palacon de la Paco*, dank'al la organizo de la loka klubo, kies programon vi trovos en via *INFORMILO*.

Al ĉiuj mi bondeziras "Ĝojan Kristnaskon" aŭ "Julon" (laŭ via kredo aŭ ne kredo)...

Baldaŭ finiĝas la jaro 2003! Ni festu la venontan pozitive... Esperanto estas celo al plibonigo de la Estonteco: tio signifas, ke "Esperante" ne nur estas pasiva maniero esti...



Jen la jarfinaj festoj... Por via propra plezuro, por plezurigi amikon, por daŭre promocii la *KD-on* tute en esperanto de Morike BÉNIN, mendu ĝin tuj ĉe nia libroservo!

Catherine



... agregacia instruisto pri beletro, dumviva membro de UFE kaj de UEA, Yves Guéguéniat forlasis nin en Bretonio la 21-an de julio 2003. Dum sia tuta profesia kariero, li loĝis en St-Pierre-des-Bois kaj tre frue malkovris la internacian lingvon, kies arda prozelito li tuj fariĝis. Niaj legantoj certe miros malkovrante ian nelacigeblan agadon, kiel raportas la ampleksa (500 paĝoj + riĉa fototeko!) "historio de Esperanto en Loreno kaj Alzaco", kompilita siatempe de nia kara amiko Jean-Paul Colnot, kaj nun konsultebla sur la reto : <http://membres.lycos.fr/historio>

1978 =

Sélestat - S-ro Yves Guéguéniat (agregacia instruisto pri beletro, lernanto de nia supera perkoresponda kurso) sendis la jenan leteron, kiu aperis en la gazeto "Le Monde" la 15-an de junio 1978:

Un professeur agrégé de lettre écrit ... Espérantiste débutant, je viens d'assimiler en trois mois les bases de l'Espéranto c'est à dire la partie théorique complète, plus 2000 racines. Je regrette de ne pas avoir commencé plus tôt l'étude de la "Lingvo internacia" (je ne traduis pas... vous avez compris). Je pense qu'au XX^{ème} siècle il n'y a pas d'humanisme véritable sans l'Espéranto. Cette langue est vivace et dynamique: elle correspond à un besoin réel. Elle a survécu à de nombreuses persécutions. Elle se développe avec insolence, au nez des Etats et des lobbies qui la boudent puérilement. Il me semble aujourd'hui peu réaliste -pour ne pas dire arriéré- de vouloir se borner, ou se résigner, pour communiquer, aux langues à prétention hégémonique : l'anglais le russe, le chinois, etc... En dépit des boycottages nationalistes, l'Espéranto vivra.... Je mettrai, pour ma part, le meilleur de moi-même dans l'étude et la diffusion de la seule vraie langue internationale. Je crois en l'Espéranto... " .. Y.G.

Post sia edzo, s-ino Guegueniat siavice eklernos Esperanton por ĝin instrui en sia liceo. La intereso por Esperanto estas grandega en la liceo de Sélestat, instruistoj pri historio kaj geografio esperas per ĝi ricevi dokumentojn el la tuta mondo.

Unuagrada kurso malfermiĝos en oktobro, kaj en la liceo, kaj en la junuldomo.

1979 =

Federacia kongreso en Colmar - ... (Jean-Paul Colnot raportas) "Dua impresado de mi forte sentita en Colmar estas la tre drasta kaj alloga interveno dum televida elsendo pri la reala, praktika kaj efika enkonduko de Esperanto en lernejarajn kursojn. Ni laŭdu por lia iniciato kaj por la propaganda efiko S-anon Guéguéniat".

1980 =

Sélestat - "Ni devas aparte gratui nian sindoneman amikon Y. Guéguéniat, al kiu ni ŝuldas 7 – jes, sep! – kursojn : 1-a kaj 2-a gradoj en Moulin de La Chapelle, 1-a kaj 2-a gradaj en la kolegio, kaj du 1-a gradaj + unu 2-a grada en la liceo... Kiu kapablas superi tiun rekordon?...". (Jean-Paul Colnot):

=====

Al la tuta familio ni sincere kondolencas



...Pentri la Pacon...

Skatolon da koloroj mi ricevis,
belegaj, brilegaj kaj klaraj koloroj.
Skatolon da koloroj mi ricevis,
por la tonoj malvarmaj kaj por la varmaj.



Mi ne havis la ruĝon por la sango de la vunditoj,
Mi ne havis la nigran por la funebro de la orfoj,
Mi ne havis la blankan por la vizaĝo de la mortintoj,
Mi ne havis la flavan por la brulantaj sabloj.
Mi havis la oranĝan koloron por la vivĝojo,
Mi havis la verdan por la folioj kaj la sprosoj,

Mi havis la lazuron por la ĉielarko,
Mi havis la rozkoloron por la revoj kaj la kvieto.
Mi eksidis kaj Pacon mi pentris...



NI JA AĜADAS



Ni aparte feliĉas gratuli nian ageman komitatano Claude DEMONGEOT,



kiu publike prezentis kaj defendis memuaron cele al ricevo de la **Supera Diplomo de Socialaj Studoj** pri la temo "*La sociala integriĝo de la gejunuloj en psika malhelpo per Esperanto*" ĉe la Regiona Instituto de la Laboro, Universitato Nancy 2 antaŭ jurio konsistanta el :
S-ro Henri OLDACHE, Instruisto ĉe IRT, Prezidanto,

S-ro Thierry CHOFFAT, docento ĉe IRT,

D-ro Thierry SALADIN, Doktoro pri Medicino, Direktoro de la *Asocio Sociala Integriĝo kaj Esperanto*, de Montpellier kun noto de 16/20.

La (francilingva) teksto estas legebla sur la ttt-ejo (en konstruado, do evoluanta) :

<http://claudisite.multimania.com>

Nous sommes particulièrement heureux de féliciter Claudy DEMONGEOT,
active secrétaire-adjointe de notre Comité

qui a présenté et soutenu publiquement un mémoire en vue d'obtenir le **Diplôme Supérieur d'Études Sociales** sur le thème : "*L'insertion sociale des jeunes en difficulté psychique au moyen de l'espéranto*"

à l'Institut Régional du Travail (IRT), Université Nancy 2 devant un jury composé de :

M. Henri OLDACHE, Enseignant à l'IRT, Président,

M. Thierry CHOFFAT, Maître de Conférences à l'IRT,

M. Thierry SALADIN, Docteur en Médecine, Directeur de l'*Association Réinsertion et Espéranto*, de Montpellier, avec une note de 16/20.

Le texte de ce mémoire peut être lu sur le site (en construction, donc sujet à évolution) :

<http://claudisite.multimania.com>

Nova adreso de Claudy

Claudy DEMONGEOT

Centre Hospitalier de Montfavet

Bungalow 71

2, rue de la Pinède

81140 MONTFAVET



... fruktodona vizito de aktiva poresperanta "migra komizo" en Loreno ...

Dankon al sinjoro Th. Saladin el *Réinsertion et Espéranto* de Montpeliero pro la diversaj intervenoj en la klubo *Esperanto Nancy 54*. Li ja multe aktivis dum la semajno..

Sabaton, la 27-an de septembro, li gvidis gramatikan kurson al kvar anoj.

Lunde, postagmeze, li ekzamenis kun du ekzamenantoj, t.e. profesoro T. Coffat kaj profesoro H. Oldache, nian klubano Claude Demongeot, kiu prezentis fakmemuaron. Ŝi sukcesis kaj ricevis gratulojn de la ekzamenantoj

Marde vespere, li elvokis la problemojn de komunikado en institucioj de Eŭropo, antaŭ 32 aŭskultantoj en la universitato Nancy 2 (*ESSSTIN*). La lingva rajtegaleco iĝos rapide sensolva kun la venonta aliĝo de dek aliaj landoj. La traduko de la diversaj lingvoj al la aliaj kostas multe kaj daŭre. Dum la prezentado de la diversaj solvoj, la debato inter la ĉeestantoj alportis konkludon: ni devus adopti lingvon, kiu ne estas nacia... Th. Saladin konkludis, ke tiu lingvo ekzistas, t.e. Esperanto...

Merkrede, li prezentis la lingvon al gejunuloj de la psikiatra centro '*Les Glacis*' en Nancy kaj de la liceo de Flavigny. Poste, li trapasigis la unuagradan ekzamenon '*ateston pri lernado*' al tri kandidatinoj, kiuj sukcesis.

Vendrede, li vizitis Strasbourg, kie li ankaŭ prelegis.

Sabate, por konkludi la semajnon, li proponis la antaŭteston de la duagrada ekzameno al la sukcesintoj en Nancy.

Je la lasta tago en Nancy, la diversaj esperantistoj gastis en la restoracio '*Le lez'art*'.

Ni opinias, ke la diversaj taskoj faritaj de Th. Saladin, estas profesnivelaj. Laŭ ni, estus bone, se la diversaj kluboj de la regiono, siavice, alvokus *Réinsertion et Espéranto*, por ke li kaj la kolego Zohra, venu instrui, aŭ prelegi, aŭ ekzameni... Tute certe, estus por la grupoj fruktodone.

Liliane Bersweiler

NB - el la redaktejo de *La Informilo*: Th. Saladin partoprenis poste, ankaŭ fruktodone, en la internacia kultursemajnfino de OBERKIRCH. Raporto aliloke.

Mulhouse-Esperanto Aktivecoj en Espace 110

La broŝuro de la Kulturdomo Espace 110 en Illzach proponas multajn aktivecojn. Inter ili ankaŭ troviĝas Esperanto. Du kursoj estas proponitaj, unu por komencantoj, ĵaŭde vespere kaj alia por progresantoj, marde vespere de la 18a30 ĝis la 20a. La loka gazeto, L'Alsace ankaŭ informis pri tiuj kursoj.

La unuaj kursoj komenciĝis komence de oktobro 2003. Finfine estas entute 5 gelernantoj. En la kurso por komencantoj informiĝis 4 kaj enskribiĝis 2. Ni uzas la Metodon 11. Por la duagrada kurso estas 3 gelernantoj. Ni uzas diversajn metodojn: "Metodo 12", "Vere aŭ Fantazie" de Claude Piron kaj "Vojaĝo al Esperanto-lando" de Boris Kolker.

La sidejo de Mulhouse-Esperanto troviĝas nun en tiu kulturdomo, kiu metas je nia dispono salonon marde kaj ĵaŭde vespere. Ni uzas ilin por niaj kursoj kaj monataj kunvenoj.

Sud-Rejna Kuriero estas la komuna bulteneto de **Mulhouse-Esperanto** kaj **Esperanto-Societo Basel**. Ĝis aperas regule komence de ĉiuj trimestroj. En oktobro aperis la numero 12. Ĝi enhavas informojn pri Svislando kaj pri suda Alzaco. Nia grupo kunlaboras ne nur kun la grupo de Bazelo sed ankaŭ kun tiu de Frajburgo.

La 6an de decembro okazis nia komuna Zamenhof-festo en Frajburo, kiu estas samtempe tri-landa renkontiĝo.

Nia retejo <http://mulhouse.esperanto.free> informas pri niaj aktivecoj kaj ankaŭ pri tiuj de **Esperanto France-Est**, pri ĝiaj staĝoj organizitaj en Francio kaj Germanio. Ofte aperas fotoj pri la okazintaj eventoj, pri niaj staĝoj en Hennezel kaj en Oberkisch. Krome en la rubriko **Esperanto en la mondo** eblas trovi multajn ligojn al aliaj retejoj.

André Grossmann

ESPERANTO

André GROSSMANN

Adultes,
Adolescents
(12 ans et +)

Pour une communication internationale plus démocratique. Une langue plus facile à apprendre que les autres. Une grammaire sans exception, sans verbe irrégulier. De plus en plus de sites Esperanto sur Internet, pour apprendre, pour s'informer, pour communiquer.

Mardi : 18h30 à 20h00 Avancés

Jeu : 18h30 à 20h00 Débutants

Début : Jeudi 2 octobre à 18h30

1er contact : Mardi 30 septembre à 18h30

Sud-Rejna Kuriero

Komuna inform-bulteno de
Esperanto-Societo Basel kaj
Mulhouse-Esperanto

ESPERANTO

Une langue pour partir au bout du monde



l'avenir des langues!

Informations:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>



SARREGUEMINES

Groupe Espéranto
Centre social-IACS
rue Roth
57200 Sarreguemines

GRUPA VIVO

La kursoj ĉi-jare nombras du nivelojn: por progresantoj (4) far de Armand Hubert, por praktikantoj (5) far de Denise Hubert.

Korespondaĵoj individue ricevitaj grupe nutras pripensadon kaj emon al internacia kompreniĝo: Belgio, Ĉekio, Ĉinio, Japanio, Senegalio. Trimestra konversacia rondo, krom kuna kaftrinko entenos distran programeron kaj literaturaĵon.

PORPACA AGADO en liceoj.

La grupo donacis dosieron « Cultivons la paix » al CDI (biblioteko) de tri liceoj en Sarreguemines. La 10-a de decembro estas datreveno de la Universala Deklaracio. Tiu okazaĵo estas oportuneco por rememori al la responsuloj de CDI pri la ekzisto de tiu dosiero al

paceduko: ĝi povas interesi instruistojn.

Samtempe oni rememoras pri la dosiero « L'Espéranto, une langue, un choix humaniste », kiu povas iĝi temo de lernanto-tasko (exposé au sujet des langues construites).*

KONIGI ESPERANTON.

Ĉiu-trimestra artikolo en gazeto pri la kursoj nur escepte alvenigas interesulojn (unu ĉi-jare). Dum dek jaroj, 40 personoj eklernis Esperanton en Sarreguemines. Dekkvar el ili nuntempe aliĝas la klubon. La rimarko « estas normale » ne konsolas pri tia multa rezigno je plulernado.

Nia tasko ja celas ampleksigi la nombron de praktikantoj, sed ĉar ni malbone sukcesas, gravas ke la vorto 'Esperanto' regule aperu en asocia medio, en biblioteko, en altlerneja domo. La buĝeto de la klubo permesas A4 formatajn afiŝojn.

Propono ĉi-jara celas grupojn kiuj jam provizas libertempajn okupojn; Esperanto estu plia allogaĵo ene de tiaj aroj. Kelkaj naturamikaj asocioj en ĉirkaŭaj urbetoj estos niaj estontaj varbceltrafoj.

*La du dosieroj haveblas ĉe GEE (enseignants): CATIL Joseph, 5 rue des Calabres, 69330 Meyzieu.

Listigo de la grupoj en la areo de Alzaco-Loreno je la 30a de junio 2003. Rezultoj de la enketo ĉe lokaj aktivuloj.
Kompilis Armand HUBERT, sekretario.

loko	grupo	sidejo / kunvenloko	responsulo / prezidanto	kutima kunveno
54	Nancy	Espéranto-Nancy 54 MJC Phil.-Desforges 27 rue République 54000 NANCY	THIBIAS Jean-Luc 7 place de Paris 54500 Vandoeuvre	ĉiun jaŭdon 19.30
55	Bar-le-Duc	Espéranto-Meuse Kulturdomo	CANUS Pierre 185 rue de Veel 55000 Bar-le-Duc	ne plu
57	Sarregue- mines	Esperanto-Stelo Centre soc. - IACS 3 rue Roth 57200 Sarreguemines	HUBERT Armand 13 chem. de la Solitude 57200 Sarreguemines.	tri unuajn mardojn de la monato: 19.00
	Thionville	Espéranto-Thionville Assoc. J. PREVERT 5 rue Jean-Mermoz 57100 Thionville	HENRY Bruno 8, rue Pasteur 57240 Nilvange	ĉiu-monate
67	Betschdorf		SCHEIDEL Odette 35 Grande-rue 67660 Betschdorf	ne plu
	Strasbourg	Centre culturel d'Espéranto Cercle d'échec rue de la Glacière 67000 Strasbourg	STAMMBACH Gilbert 24 rue A. Zimmer 67610 La Wantzenau	lastmerkrede de la monato
68	Colmar	Take-La Domo BASSO Michel 83 rue Tiefenbach 68920 Wintzenheim	LUDWIG Edmond 26 route de la Schlucht 68140 Munster	ĉiun sabaton matene
	Mulhouse	Mulhouse-Espéranto Espace 110 avenue Rives de l'III 68110 Illzach	GROSSMANN André 5 rue des Pyrénées 68390 Baldersheim	unua mardo de la monato
88	Epinal	Spina-klubo + Mezlerneja kurso Cours Charlemagne 10, rue Thiers 88000 Epinal	DESBRIERES Emmanuel et Florence 13bis, av A-Briand 39110 Salins / Bains	merkrede, 18.15
	Epinal	Naturamikoj Kultura Centro 88000 Epinal	BERNARDIN Manette 6 rue Lieut Léonard 88000 Epinal	lunde 19.45
	Gérardmer	Esperanto-Klubo + Mezlerneja kurso Maison de la Culture 88400 Gérardmer	MARTIN Ginette 92 rue Riant-Coteau 88290 Saulxures/Moselotte	ĉiun duan vendredon 14.30

Krucumitaj programeroj far de la dekunu grupoj : 2002 - 2003

konversacia rondo	8		<i>Pliaj okazint- / okazontaĵoj en</i>
internaciaj rilatoj	7		
gazetartikoloj	7		Nancy
gastigo de alilandano	6		Bar-le-Duc
festa tago / Zamenhoftago	5		Sarreguemines
prelego	5		Thionville
revuo/ bulteno	4		Betschdorf
kunvenarango	4		Strasbourg
ekspozicio	3		Colmar
foirumo	2		Mulhouse
vojaĝo	2		Epinal
televida elsendo	1		Epinal/ NAMik
sukcesa varbado por PKK	0		Gérardmer
			ZEO/Champenoux Centro Psikoter.:ekspoz + kursoj
			Centre Paix : ekspozicio+prelego ;printempa staĝo
			afiŝoj en universitato ; porpaca agado en mezlernejoj
			budo: festo Luksemburga; Amnesty ; asocia festo
			individua klopodo ; perkoresponda korektantino
			prelego de T.Saladin
			esperantigo de dokum. ; fakaj kontaktoj eksterlandaj
			retejo ; libroj urba bibliot. ; festo en universitato
			koncerto: Bronstejn ; traduko dokum. ; lerneja kurso
			gastigo:Portugalo; vojaĝo:Germanio, Nederlando;
			varbado MJC, lernejo ; kurso en teknika mezlernejo

Pliaj notindaĵoj : Fontenoy-la-Joute: aranĝis Jacques Herlé + Nancy + Gérardmer+ Bar-le-Duc
vojaĝo al Prago, 2004:Nancy bulteno kun Bazelo : Mulhouse

Memuaro de Claudy Demongeot:"L'insertion sociale des jeunes en difficulté psychologique par l'espéranto"

30/09/2003: Diplôme supérieur d'études sociales - Université Nancy 2

Duobligo de esperanta kurso en teknika mezlernejo, Saulxures (Gérardmer)

KIE, KIAM, KIAMANIERE mi sekvis la tria-gradan kurson de Esperanto, de Marcel REDON

Oktobre 2002, en Nancy mi ĉeestis semajnfinan staĝon de Esperanto. En la libroservo mi vidis novan libron: "Vojaĝo al Esperanto-Lando" de Boris KOLKER. Germana samideanino forte laŭdis tiun libron. (temas pri Ursula Niesert).

Reveninte hejmen mi decidis sekvi tria-gradan kurson por perfektigi mian skribadon kaj paroladon en Esperanto.

Unue mi skribis al Robert KUENY, respondeculo de la perkorespondaj kursoj en Kultura Esperanto-Federacio de Orienta Francio. Li tuj proponis, ke André GROSSMANN el BALDERSHEIM estu mia goidanto kaj korektanto.

La 9an de novembro 2002 mi sendis banĉekon je 60 eŭroj je la nomo de Esperanto France-Est. Tuj André sendis al mi la verkon "Vojaĝo al Esperanto-Lando" kaj mi komencis la legadon kaj la laboron.

Mi decidis ĉiusemajne labori por Esperanto lunde (matene aŭ posttagmeze aŭ vespere). Rapide, ekde la komenco mi trovis tiun libron tre interesa. Mi konatiĝis kun gravaj esperantistoj kaj verkistoj. Inter ili: Ludoviko ZAMENHOF, Claude PIRON, Emilja LAPENNA, Cezaro ROSSETTI, Raymond SCHWARTZ, Edmond PRIVAT, Tibor SEKELJ, Vasily EROŝENKO, Gaston WARINGHIEN, William AULD kaj aliaj.

En la enkonduko Kep ENDERBY (tiam prezidanto de UEA) skribas: Mi deziras al ĉiuj legontoj kaj studentoj agrablan vojaĝon en nia Esperantujo kun la kompetenta ĉiĉerono Boris KOLKER.

Dank'al tiu Esperanto-literaturo ankaŭ mi faris agrablan vojaĝon tra diversaj landoj: galope tra la historio de Usono, tra la esperantaj memorigaj lokoj en Moskvo, tra kelkaj moroj en Belgio, tra la ĉina gimnastiko, tra la universala biblioteko de Esperanto en urbo Vieno...


Komencinte la kurson en decembro 2002, mi finis la lastajn taskojn en julio 2003.

Mi aplaŭdas amike mian majstron André GROSSMANN. Li ĉiam rapide korektis kaj resendis miajn taskojn. Li ĉiam kuraĝigis min per taŭgaj kaj amikaj konsiloj.

Do, nur unu rekomendo:

Traleĝu tiun belegan libron "Vojaĝo al Esperanto-Lando". Havu iom da kuraĝo kaj libertempo por fari la ekzercojn de la 26 lecionoj. Vi ne bedaŭros.

Marcel REDON



Kiam Marcel Redon sciigis al mi sian deziron sekvi tria-gradan kurson, mi proponis al li uzi la novan libron "Vojaĝo al Esperanto-Lando", kiun mi tiam ankoraŭ ne estis leginta.


Mi proponis al li, ke ni kune spertu pri tiu libro, por scii, ĉu ĝi taŭgas kiel materialo por la tria-gradan kurso; li kiel lernanto, mi kiel korektanto.

Tial ni preskaŭ kune konatiĝis kun la libro, kaj ĝuis la vojaĝon al Esperanto-lando, al ĝia intereso-plena literaturo, al ĝiaj gravaj historiaj eventoj, al ĝiaj pioniroj, verkistoj, kiuj igis Esperanton moderna lingvo.

Certe Marcel multe pli laboris ol mi. Li diligente faris siajn taskojn, multe skribis kaj tiel ankaŭ instigis min konatiĝi kun pliaj lecionoj.

Mi ĝojas pro tiu amika kunlaboro kaj gratulas al Marcel pro lia diligenco.

André Grossmann



Ni informas vin, ke niaj du junaj kamaradoj, Alphonse WASEKA kaj Gertrude BEMBELEZA ĵus pasigis iom da tempo en la urboj **Kalonge** kaj **Kavumu** (per boato tra la lago Kivo!) por disvastigi Esperanton, laŭ peto de Sinjoro Daniel DURAND.

Tiuj urboj troviĝas je 250 km for de **Goma**, kie vivas la junaj kamaradoj.

Ni libere konsentis disvastigi tiun belan lingvon, por ke ĝi fariĝu la dua lingvo de ĉiu homo.

Ni scias ke UEA, la Afriko Oficejo kaj aliaj organizoj ne estas riĉaj, sed ili devas scii kiamaniere direkti helpojn al la Afrikaj kluboj, kiuj dediĉiĝas labori por disvastigi nian

neŭtralan lingvon.

Niaj kamaradoj el Kalonge kaj Kavumu petis nin reveni la 26-an de oktobro kaj decembro 2003 por plia sesio. Ni petas vian kunlaboradon moralan kaj ankaŭ vian subtenon en materialaj rimedoj. Ĉar ni estas volenerĝiaj kaj libere konsentis labori por nia universala lingvo paca kaj solidareca, ni eltenis solaj ĉiujn elspezojn...

Karaj gesamideanoj, ni kredas kunlabori kun vi por disvastigi Esperanton en Afriko !

Pensu pri ni !

Alexis BENGANTUNDU esperoab@yahoo.fr

☆☆☆

Kion do faru ni, aliaj Esperantistoj, por niajn ruandajn geamikojn? Morale oni subtenas sendante mesaĝojn al Jean Paul Alexis, esperoab@yahoo.fr, aŭ per la poŝto al: ASUMANI BENGANTUNDU Jean-Paul Alexis, B. P. 78, **Gisenyi, Rwanda**.

Materie oni subtenas sendante kelkajn lernolibrojn: *Nouveau Cours Rationnel et Complet*, *Junulkurso*, kaj aliajn. Ne tro multajn, ĉar ne ĉiu lernanto bezonas propran lernolibron. La instruistoj havu sian ekzempleron, kaj per ĝi instru la lernantojn parolante kaj skribante sur la tabulo... sed vortarojn (franca-Esperanto kaj Esperanto-franca) aŭ poŝvortarojn ĉiu kursfininto devus ricevi donace, kune kun kelkaj gazetoj kaj insigno.

Tiu, kiu volas helpi tiunaniere, unue sciigu al ili la intencon kaj demandu kiel sendi por eviti altajn doganimpostojn...

Tiu, kiu volas helpi la afrikan agadon pli vaste, donacu al la *Kapitalo Afriko* (grandaj sumoj) aŭ al la *Afrika Konto* (negrandaj sumoj). Adreso: UEA, Rotterdam, uea@uea.org

Por pli da informoj pri la afrika agado, bonvolu turniĝi al La Afrika oficejo de UEA, afrika.oficejo@uea.org aŭ al Hans BAKKER, hansbakker@raketnet.nl

Hans BAKKER



infanaj desegnoj petitaj



por granda ekspozicio

En 2004, la Esperanto-Centro de Angers (Francio), festos la centan datrevenon de la kreado de esperanta grupo en la urbo.

Je tiu okazo, oni antaŭvidas diversajn manifestaciojn kaj interalie, internacian ekspozicion de infanaj desegnoj, sub oficiala patronado, pri la ĝenerala temo de la "*daŭra disvolviĝo*" (protektado de la naturo, arbaroj, bestoj, lukto kontraŭ la polucio, lernejoj por ĉiuj infanoj, suna energio, pli sana agrikulturo, agado por havigo de pura akvo, protektado de la sano, k. t. p.).

La plej belaj desegnoj estos premiitaj kaj por la lernejoj kolektivaj sendoj, oni povos antaŭvidi interŝanĝojn de desegnoj kun francaj lernantoj.

Estos tri kategorioj por la partoprenantoj :

- ĝis 7 jaraĝa ; - de 7 ĝis 10 jaraĝa ; - de 10 ĝis 14 jaraĝa.

La desegnoj estas sendotaj, ĝis la fino de 2003, iu ajn formato, al :

Esperanto-centro S-ro Frangeul 6, rue du Buis, 49000 Angers. Francio

Internet-kuriero :

bertrand-gilet@wanadoo.fr
pierre.jagueneau@wanadoo.fr

2004 – renkontiĝoj, vojaĝoj kaj kongresoj

2 - 4. januaro

Zamenhofologiaj Tagoj pri Lidja Zamenhof kun prelegoj de gravaj zamenhofologoj en La Chaux-de-Fonds. Inf: Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. Tel/fakso: +41-32-9267407. Rete: KCE.esperanto@post.club-internet.fr

17 - 24. januaro

Turisma Fervojista Esperanto-Skisemajno en Argentiere. Inf: Peyrouy Hubert, 6 Villa du Progrès, FR-94230 Cachan, Francio
turismo@bydg.pdi.net

30 januaro

- 8 februaro

Internacia Pedagogia kurso en Bydgoszcz kun Cseh-Seminarioj gvidataj de Ewa Bondar. Inf: Internacia Klubo "Esperantotur", str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. Tel/fakso +48-52-3461151. Rete: turismo@bydg.pdi.net

31 januaro - 1. februaro

Kultura Semajnfino pri lingvistika temo en La Chaux-de-Fonds. Inf: Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. Tel/fakso: +41-32-9267407. Rete: KCE.esperanto@post.club-internet.fr

21 - 28. februaro

REK-EoLA, 23-a Rusia Esperantista Kongreso kaj 16-a festivalo EoLA en Volgograd. Inf: Eduard Kolosovk edya@yandex.ru

25 - 29. februaro

ADORU - la ekumena preĝ- kaj kant-libro. Kantoj kaj Diservoj, Diskutoj pri la libro kaj pri Esperanto, en Strasbourg. Inf: rete: Bernhard.Eichkorn@esperanto.de

26. februaro - 08. marto

5-a Himalaja Renkontiĝo en Nepalo. Inf: rete: esperanto@wlink.com.np

28 - 29 februaro

Kultura Semajnfino en La Chaux-de-Fonds. Inf: Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. Tel/fakso: +41-32-9267407. Rete: KCE.esperanto@post.club-internet.fr

28. februaro - 06. marto

Koruso-semajno en Montferrier, Francio. Inf: Claude Fressonnet 43 Place du Rumat FR-09500 Mirepoix, rete: mailto:%20claud.fressonnet@wanadoo.fr, tel: (33) (0)5 61601895

26-28. marto

Printempa Staĝo de "Espéranto France-Est" en "Centre Mondial de la Paix" (55100 VERDUN). Inf: Pol Denis, 5 Chemin de Blamecourt, 55000 Bar-le-Duc – pol.denis@wanadoo.fr

27 - 28 marto

Kultura Semajnfino en La Chaux-de-Fonds. Inf: Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. Tel/fakso: +41-32-9267407. Rete: KCE.esperanto@post.club-internet.fr

5 - 12. aprilo

20-a PSI - Printempa Semajno Internacia en Duderstadt, Germanio. Inf: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, psi@esperanto.de

7 - 13. aprilo

Internacia Junulara Festivalo, IJF - Internacia Junulara festivalo en Abetone (PT) - Italio. Inf: ijf.admin@esperanto.it

10 - 12. aprilo

59-a SAT-Amikara Kongreso en La Roche-sur-Yon (departemento Vendée). Inf.: Laborista Esperanto-Asocio FR-75020 67, Avenue Gambetta Paris, Francio

30. aprilo - 3. majo

Brita Kongreso de Esperanto en Felixstowe, Anglio. Inf: EAB, Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE, Britio. Tel. 0845-230-1887, de eksterlande +44-1782-372141. Rete: esperanto@btopenworld.com

7 - 9. majo

5-a Trilanda Renkontiĝo de Germana Esperanto-Junularo en Heppenheim, Germanio. Inf: Inge Simon, Simon-Esperanto@t-online.de

8 - 15. majo

56-a IFEF-kongreso en Sopron. Inf: Alfonz Móró, Olga u. 3. HU-7632 Pécs, Hungario. Rete: ifk56@freemail.hu

printempa semajno internacia

germana esperanto-asocio <http://www.esperanto.de/psi>

20a PS



la paska renkontiĝo por la tuta familio

Duderstadt
5 - 12 aprilo 2004
Germanio

kotizoj:

la 3a kaj pliigaj
infanoj ĝis 12
jaroj estas
senpagaj!

Eŭroj (€)	simpila ĉambro (duŝo + necesoj)	luksa ĉambro (duŝo + necesoj)
0 - 2 jaroj	0	0
3 - 6 jaroj	115	130
7 - 12 jaroj	170	195
13 - 18 jaroj	210	240
19 - 25 jaroj	230	255
pli ol 25 jaroj	260	290
unulita ĉambro	-	340

La kotizo inkluzivas loĝadon, 3 manĝojn tage kaj endoman programon. Ekskursoj estas surloke aparte pagendaj. Materialon por manlaboroj oni pagas laŭ uzita kvantito surloke.

- por fruaj aliĝintoj ĝis 31.12.2003: **10 €**
 - por fruogaj aliĝintoj ĝis 31.10.2003: **20 €**
- en formo de bonhavaj kuponoj por pagi en nia trinkejo.

subvencioj:

por partoprenantoj el eks-socialismaj kaj nepagipovaj landoj laŭ niaj financaj eblaj kaj eventuala programkontribuo. Bonvolu priskribi vian eblan kontribuon al la programo. Oficialajn invitilojn ni sendas nur al homoj kies programkontribuon ni akceptis.

krompagoj:

por ne-membroj de GER/GEJ loĝantoj en Germanio: **25 €**

kondiĉoj:

Via aliĝo ekvalidas nur per antaŭpago de minimume **50 €** por ĉiu persono. Ĝi estas parto de la kotizo. La antaŭpago respektive la plena kotizo, se jam pagita, minus **10 €** estos repagata nur post ĝustatempa malaliĝo antaŭ la 1-a de marto 2004. Post tiu dato la antaŭpago ne estos repagata.

Bonvolu pagi vian plenan kotizon (minus antaŭpago) ĝis la 1-a de marto 2004 al la supre menciita konto. Eksterlandanoj pagu nur post ricevo de nia skriba konfirmo al la tie menciita konto. Ni volas redukti ĝis minimumo la altajn bank-kostojn.

aliĝoj- informoj



Germana Esperanto-Asocio

Wolfgang Bohr
Johannes-Hirschweg-Str. 11, D-53474 Bad Neuenahr - Ahrweiler



Telefona: +49-(0)2641-4885
Telefaksa: +49-(0)2641-9786-66 (oficejo)

pagoj

€ Konto 8603601, Bank für Sozialwirtschaft (BLZ 550 205 00)
Deutscher Esperanto-Bund e.V., rirmarko: „20-a PSI“



psi@esperanto.de
<http://www.esperanto.de/psi>


esperanto

26 - 27 - 28 mars 2004

France-Est

55ème stage régional

VERDUN
France



COMMENT ATTEINDRE LA VILLE DU STAGE ?

par le train : veuillez consulter l'agent de la gare de votre résidence.

Si nécessaire, nous irons vous chercher à votre arrivée.

en voiture par l'autoroute A 4 (ceux qui s'inscriront, recevront un plan détaillé.)
par la route nationale RN3, qui relie Paris à Strasbourg. (axe Est/ Ouest)
par la départementale RD 904, qui relie Sedan à Neufchâteau. (axe Nord/Sud)

COURS

- A = pour débutants -
Ginette Martin apportera le matériel adéquat.
- B = pour progresser -
Gérard Greiner utilisera « la méthode 15 »
apportez votre livre si vous en avez un.
- C = pour converser
sous la conduite de André Grossmann
- D = conférence= Claude Gacond présentera une
petite anthologie sur « les aspirations à la
paix dans la monde Espéranto »

Je désire participer au cours A - B - C - D

Veuillez indiquer votre choix :

*Si vous désirez des billets d'entrée gratuits pour les
2 expositions du Centre Mondial se la Paix,
(voir le document inclus dans la revue « La Informilo »)
pour vos amis qui auraient l'occasion de venir à Verdun
plus tard,
veuillez nous en indiquer le nombre ici*

INSCRIPTION

Veuillez SVP remplir un formulaire par
personne inscrite

La cotisation couvre le cours que vous
avez choisi.

Elle n'est pas remboursable en cas de
non participation.

Si vous désirez plus d'informations, veuillez de
préférence les demander par courriel à:

Pol Denis : pol.denis@wanado.fr

F.X. Gilbert : efikso@aol.com

C'est possible aussi par téléphone:

Pierre Canus: 03.29.45.32.18

Pol Denis: 06.98.09.62.81

F.X.Gilbert: 03.29.89.82.15

Bien sûr, vous avez aussi le droit d'écrire à

Pierre CANUS: 185, rue de VéeL

FR - 55000 Bar le Duc

PSI

Printempa Semajno Internacia

estas granda internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝi okazas ĉiujare dum unu semajno ĉirkaŭ pasko ie en Germanio. Por la 20-a PSI ni atendas pli ol 170 partoprenantojn el pli ol 15 landoj, el kiuj minimume triono estas infanoj diversĝoj.

Familioj

PSI estas prefere familia seminario. La programo celas kontentigi samojte plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn. Sed tio ne ekskluzivas unuopulojn, ĉiu estas bonvena.

infanoj

Okazas apartaj programeroj por infanoj laŭ aĝo kaj lingvohoro. Kaj komencantoj kaj flue parolantoj havos sian programon. Ĝepatroj de havas bonan okazon trankvile partopreni siajn programerojn sen infanoj - aŭ kun la infanoj, se ili preferas.

junuloj: PU

Santempe kaj samloke kun PSI okazas *Printempa Lernejo Internacia*. Ĝi estas speciala arango por gejunuloj inter 10 kaj 16 jaroj, kiuj almenaŭ iomete parolas la internacian lingvon. Por ili okazas apartaj kursoj pri kaj en Esperanto. Ili loĝas en komunaj ĉambroj kaj lernas, ludas kaj festas kune.

Komencantoj

Se vi aŭ via partnero aŭ ambaŭ estas komencanto(j) aŭ eĉ neesperantisto(j), ne timu. Vi estas bonvenoj! Ni aranĝas kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Sed ankaŭ aliaj programeroj konsideras la komencantojn.

programo

La seminario enhavas kaj *laborojn* kaj *distrajn* elementojn por ĉiuj aĝoj. Certaj programeroj fojgis jam tradiciaj:

- ◆ Diskutgrupoj kaj prelegoj pri plej diversaj temoj
- ◆ Kursoj pri ludoj, dancoj, kantoj, muziko, ...
- ◆ Lingvokursoj por komencantoj, progresintoj kaj infanoj
- ◆ Mazi-kursoj ĉitagoj por infanoj
- ◆ Nacilingvaj kursetoj parolantoj de diversaj lingvoj prezentas sian lingvon en mallonga kurseto.
- ◆ Artaj manlaboroj pri ornamantoj, pentrado, ŝtotoj, ornamto, ...
- ◆ Ekskursoj al vidindaĵoj en la regiono kaj najbaraj urboj
- ◆ Kinēja horo ĉitagoje, ie fiksitaj horo vi povas spakti video-filmojn aŭ lumbildojn.
- ◆ Vespere kultura programo koncertoj, prezentadoj, magio, ...
- ◆ Kafejo – trinkejo – babiliejo ĉitagoje malfermita
- ◆ Kaj ... eble via oferto ...



Impresojn pri pasintoj PSIoj vi trovas en Interreto:

<http://www.esperanto.de/psi>


La organiza teamo bezonas helpon dum la PSI-semajno.
(trinkejo, kafejo, ekipoj de la seminaristoj, transporta servo ktp.)
Bonvolu indiki vian pretecon en la aligilo - dankon.

Duderstadt

Duderstadt estas bela mezepoka urbo kun 23.000 loĝantoj, pli ol 500 antikvaj trob-fakoj domoj kaj granda parto de sia lano defenda turo.

Ĝi situas preskaŭ meze de Germanio en la montaro Harz, proksime de Göttingen kaj tuj apud la iama „fero kurteno“, la limo inter la du Germanioj. Ĝi apartenas al la germana federacia lando Niedersachsen (Malsupra Saksio).

La ĉirkaŭo de Duderstadt, precipe la montaro Harz kaj la proksima naturprotektejo Seeburger See (lago de Seeburg), estas tre bela kaj vizitinda. La programo antaŭvidas plurajn ekskursojn al proksimaj vidindaĵoj.



Preziza situo:
10° 29' oriento
51° 52' norde

Interreto: <http://www.duderstadt.de>

La PSI-ejo Jugendgästehaus Duderstadt

Loĝado kaj programo okazos en Jugendgästehaus Duderstadt, relative nova kaj tre moderna junulera domo kun ĉirkaŭ 230 litoj. Ni loĝos en 1., 2., 3- kaj 4-likaj ĉambroj kaj familiaj loĝejoj. Preskaŭ ĉiuj ĉambroj havos duŝon kaj necesojn.



Je nia dispono estas pluraj diversgrandaj kunsidaj ĉambroj (parte por handikapuloj), aŭto, komenĉambro, biblioteko, metitejoj, dancejo, gimnastikejo, tablotenisjo, diskoteko kaj trinkejo/kafejo. La lokaj ofertoj de la seminariejo ebligas abundan kaj varlan programon.

La ejo estas tre taŭga por infanoj ĉirkaŭ la domo mem troviĝas vasta tereno por ludi. Krome ĝi situas tuj apud la urba parko, kiun eblas atingi sen transiri straton. Tra la parko oni facile atingas la malnovan urbon.

La 18a kaj la 13a PSI jam okazis ĉi tie kaj multaj partoprenintoj proponis reveni ĉi tien.

La seminariejo estas moderne kaj bonege ekipita por niĝaj celoj:

- ◆ oro da salonoj kaj aŭlio (200 pers.)
- ◆ metitejo (ankaŭ porfarista nodo+bakformo)
- ◆ trinkejo kaj kafejo
- ◆ gimnastikejo / dancejo
- ◆ tablotenisjo
- ◆ tablofutebalo
- ◆ televidiloj
- ◆ videoeksesoroj
- ◆ piedpilka kampo (ekstere)
- ◆ retpilka kampo (ekstere)
- ◆ diskoteko kelo



Interreto: http://www.djo-niedersachsen.de/index_duderstadt.htm



EUROPA BUNTO

**Manifestacio por lingva
demokratio en Eŭropo**

9 majo 2004



Strasbourg / Straßburg
<http://europa.bunto.free.fr>

...trans ponto ESPERANTO

2004 : Eŭropa Unio iĝos de 15 al 25 landoj, kaj tiel de 11 oficialaj lingvoj al 20. Sed la lingva aspekto de Eŭropo ankoraŭ ne multe estis pritraktata, kaj kun tiom granda nombro da oficialaj lingvoj, kiel konservi justan plurlingvismon : ĉu ne riskas aperi disiĝo inter "etaj lingvoj" kaj "grandaj lingvoj" ? kaj kio okazos por ĉiuj neoficialaj lingvoj nomataj "minoritataj" ? kiel eviti la lingvajn hegemoniojn, kiuj jam aperas pro celo je efikeco ?

Al ĉiuj, kiuj deziras atesti sian intereson por la lingva kaj kultura diverseco de Eŭropo. Al ĉiuj, kiuj deziras defendi siajn minacatajn radikojn. Al ĉiuj, kiuj pro nescipovo de ĉiuj najbaraj lingvoj, proponas la uzon de internacia lingvo neŭtrala Esperanto kiel komunikilo. Al tiuj ni faras ĉi-inviton.

Partoprenu la 9-an de majo 2004 en Strasburgo en la unua manifestacio **EUROPA BUNTO**, kiu estos okazo por fari komunajn kaj inter-asocian alvokon favore al

justa respekto de la lingva diverseco en Eŭropo.

Por ĉiaj informoj :

Eŭropa Bunto, 6 rue J-P Calloc'h, F-22000 St-Brieuc (FRANCE)

Tel : +33 (0)2.96.68.55.21.

Retadreso : europa.bunto@eraro.com


TTT-ejo : <http://europa.bunto.free.fr>





Denove legeblas **Eŭropa Bulteno** - nun en la interreto kaj en pdf-formato ĉe:
<http://lingvo.org/bulteno> (pasvorto: saluton).

Ĝi estas informilo pri *Eŭropa Esperanto-Unio* kaj pri la Eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale.

Ĉiuj komentoj, stile, lingve kaj enhave, estas tre bonvenaj.





EKSKURSOJ

◆ **MARSEILLE - Tutaga ekskurso, vendredon la 21-an**
2600-jara mediteranea urbo, kosmopolita metropolo, granda haveno... Programo : matene, malkovro de la urbo, vizito de la fama baziliko Notre Dame de la Garde kaj posttagmeze, ŝippromenado tra la malnova haveno ĝis la insulo / kastelo If, vizito de la kastelo diskongita de la fama libro de Alexandre Dumas « *La grato de Monte-Kristo* » au libera promenado tra Marseille La du prezoj inkluzivas la aŭtobusan vojiron La Roque / Marseille (iron/reiron). La prezo 2 ple inkluzivas la tagmanĝon, la ŝippromenadon kaj la eniron en If kastelon
Prezo 1 : 14 € / pers
Prezo 2 : 42 € / pers

◆ **LA ROQUE D'ANTHÉRON - Duhora arbara promenado, sabato**
ton la 22-an - Malkovro de la mediteraneaj vegetaĵoj Senpaga matene

Duhora vizito de la abatejo Silvacane, dimanĉon la 23-an, matene

Oni nomas ilin « *Les trois saints provençales* ». Temas pri la tri famaj cisterciaj abatejoj de suda Francio : Senanque en Luberon, Le Thoronet en Var departemento kaj Silvacane Tiu lasta stas en La Roque kaj ĝi estas nepre virinda !
Prezo : 6 € / pers.

◆ **AIX-EN-PROVENCE—Duontaga ekskurso, dimanĉon la 23-an, posttagmeze** - Ĉarma provenca urbo, kies linka muzikofestivalo estas internacie fame konata, kies apudaj kamparaj ĉirkaŭaĵoj estis pentritaj de Cézanne. Pleŝda promenado tra la malnova urbo kaj malkovro de kelkaj el ĝiaj cent fontanoj.

Aŭtobusa vojiro La Roque / Aix (iro/reiro) : 11 € / pers.

◆ **AVIGNON - Duontaga ekskurso, lundon la 24-an, matene**
Ankaŭ ĝi havas festivalon - ĉifoje pri teatro, fame konatan kiel tiu de Aix au La Roque d'Anthéron... La kulturaj valoraj vidindaĵoj de Avignon estas multnombraj - la impona « *Palais des Papes* », la mondfama ponto Saint-Bénézet sur Rhône riverigo, multaj muzeoj, ktp... Avignon estis unu el la Eŭropaj ĉefurboj pri kulturo en la jaro 2000 Programo : vizito de la palaco. La prezo inkluzivas la eniron en la palacon kaj la aŭtobusan vojiron La Roque / Avignon (iron/reiron).
Prezo : 27 € / pers.

Por havi pliajn informojn pri la lokaj aspektoj de la kongreso, bonvolu kontakti :
Sro Daniel MOIRAND
18-bis, rue Marechal Joffre
13100 Aix-en-Provence
Tel/fax 04 42 38 52 03



LA ROQUE
D'ANTHERON

esperanto
FRANCE

www.esperanto-france.org

La Roque d'Anthéron de la 19-a ĝis la 24-a de majo

PROVENCE

La Informilo 24



Congrès 2004 de l'Espéranto en France

La kongreso okazos en Provenco 30 kilometrojn norde de Aix-en-Provence, en vilaĝo La Roque d'Anthéron, en la valo de la rivero Durance. Ĝi estas historia centro de la Valdanoj (*les Vaucluses*) kaj estas konata pro sia Internacia Festivalo de Piano, unu el la plej famaj festivaloj en suda Francio, kaj ankaŭ pro la cistercia abatejo Silvacane.

Vi povos alveni antaŭ la kongreso kaj resti eble longe por ripozi aŭ promeni... La turismaj allogaĵoj estas multnombraj en ĉi-tiu regiono (Luberon, Verdon kaj Camargue naturaj parkoj, mediteranea marbordo, artaj kaj historiaj urboj kiel Aix-en-Provence, Marseille, Avignon, Arles, ĉarmaj provencaj vilaĝoj, ktp...)

Dum la kongreso, vi ĝuos konatan restadon en la ferivilaĝo La Baume. Aŭtobusetoj estas senpage je via dispono por veturigi vin de la kongressejo, en la vilaĝo. Se vi preferas iĝi en hotelo, ĉe privatuloj aŭ tenementoj, vi tamen rajtos manĝi en La Baume (se vi enskribiĝis...)

Venu kaj ĝuu internacian kaj provencan etoson, ricepiĝemajn kulturajn vizitojn, aktivulaĵojn, kunisidojn, fruktodonajn interŝanĝojn.



Mazi en Gondolando

Konatiĝu kun la plej moderna aŭdvida Esperanto-kurso: "MAZI EN GONDOLANDO"

La kompleto konsistas el:

- 2 vid-bendoj
- 1 kasedo kun kantoj
- 1 libro kun la dialogoj kaj multaj bildoj

La tuto nur por 39 eŭroj + 5,10 eŭroj por la sendkosto!

Mendebia ĉe:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

andreo.grossmann@free.fr

Pagebla per postĝiro aŭ sendo de ĉeko je la nomo de: Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY



Congrès 2004 de l'Espéranto en France

La Roque • 19 - 24 mai

INDIVIDUA ALIĜILO
Bonvolu sendi tiun aliĝilon kun via pago (per franca ĉeko je nomo de « Espéranto La Roque ») al :
Sro Daniel MOIRAND
(Congrès 2004)
18-bis, rue du Maréchal Joffre
13100 Aix-en-Provence

Supplément à «Le Monde de l'Espéranto» du mois

Mi aliĝas al la esperantokongreso 2004 laŭ la subaj kondiĉoj kaj pagas la koncerajn sumojn

S^o S^{ino} Familia nomo: Antaŭnomo:

Naskiĝdato:/...../..... Adreso:

Poŝto kodo: Urbo: Lando:

Tel.: Faksno: Retadreso:

Mi membras en unu el la partoprenantaj asocioj: (nomo de la asocio)

ALIĜO

Ĝi entenas aliron al la kongresejo, laborgrupojn, prelegojn kaj vesperojn. Ĝi inkluzivas nek loĝadon, nek manĝon, nek turismajn programojn sed transporton inter la kongresejo kaj La Baume.

MI PAGAS :
..... €
..... €
..... €
..... €
..... €

SUMO (a) : €

LOĜADO

Mi mem zorgas pri mia loĝado :

- en kampadejo
 en hotelo
 ĉe privataĵo

Mi loĝos en La Baume kaj mi mendas :

- tutan domon
 unu ĉambro
 unu liton en ĉambro

..... €
..... €
..... €
..... €
..... €

SUMO (b) : €

MANĜOJ

Mi antaŭmendas manĝojn en La Baume.

Mi estas vegetarano : jes ne

	19	20	21	22	23	24
Matene	X	4 €	4 €	4 €	4 €	4 €
Tagmeze	11 €	11 €	11 €	11 €	11 €	11 €
	13 €	13 €	13 €	13 €	13 €	13 €
Vespere	11 €	11 €	X	11 €	11 €	X
	13 €	13 €	13 €	13 €	13 €	13 €
Bankedo	X	X	35 €	X	X	X

..... €
..... €
..... €
..... €
..... €

SUMO (c) : €

Ne forgesu plenigi la alian flankon de la aliĝilo !

Maison Culturelle de l'Espéranto
Château de Grésillon
F - 49150 BAUGE

Angers, le 10 octobre 2003

Organisme : **Espéranto France-Est**

Nous avons bien reçu votre chèque de 76 € du 18 août, au profit de la rencontre d'enfants 2003.
Nous vous en remercions vivement et vous prions d'accepter nos plus sincères salutations.

Pour le Conseil d'Administration
Le trésorier

La Kulturdoma Komitato tutkore dankas vin pro via solidareca kaj malavara gesto



... Kio estas " SOLVILO " ?

Karaj abonantoj :

Al ni ĉiuj malplaĉas ne sukcesi finplenumi vortkručenigmon...

Tio neniam plu okazos al vi, se vi uzos la programon SOLVILO, kiu montras la diversajn solvojn eblajn por plenumi kadrojn.

Ĝi montriĝos ankaŭ tre utila en diversaj cirkonstancoj, kies plezuron malkovri ni lasas al vi.

Ligo en la rubriko *Aliaj Programoj* de la TTT-ejo de *La Vortaro*: <http://www.la-vortaro.net> ebligas al vi vidi kaj elŝuti la programon !

SOLVILO funkcias sub *Vindozo* ekde la versio 98.

Bonajn vortkrucesolvadojn

Ĝis!

Bernard(o)

MI PAGAS :

..... €
..... €
..... €
..... €

SUMO (d) :
..... €

..... €
..... €
..... €
..... €
..... €

SUMO (e) :
..... €

SUME
a+b+c+d+e
..... €

TRANSPORTO

- Mi veturos el (urbo) kaj mi proponas loko(j)n en mia veturilo
- Mi forveturos el La Roque la-an de majo je la horo
- Mi veturos trajne kaj alvenos en Aix / TGV la-an de majo je la horo.
- kaj mi uzos la komunan aŭtobusejon de la stacidomo al La Roque d'Anthéron (mi pagas 5 €) ↑
- Mia trajno forlasos Aix / TGV la-an de majo je la horo.
- kaj mi uzos la komunan aŭtobusejon de la La Roque al la stacidomo (mi pagas 5 €) ↑
- Mi alvenos aviadile la-an de majo je la horo
- kaj mi haltos en Aix / TGV je la horo por uzi la aŭtobusejon de la stacidomo al La Roque (mi pagas 5 €) ↑
- Mia avialido forlasos Marseille-Provence la-an de majo je la horo.
- kaj mi uzos la komunan aŭtobusejon de La Roque al la stacidomo Aix / TGV (mi pagas 5 €) ↑

- Mi ankoraŭ ne scias kiel mi veturos sed mi zorgos mem pri mia alveno kaj foriro. Mi intencas alveni en La Roque d'Anthéron la-an de majo je la horo kaj foriri la-an de majo je la horo.

- En La Roque d'Anthéron, mi nepre uzos la komunan aŭtobusejon, senpage.

EKSKURSOJ

- Ekskurso al Marseille (la 21-an) Nur aŭtobuso 14 €
kun tagmanĝo, ŝipromenado kaj vizito de la kastelo 42 €
- Vizito de Silvacane (la 23-an matene) 6 €
- Ekskurso al Aix-en-Provence (la 23-an posttagmeze) 11 €
- Ekskurso al Avignon (la 24-an matene) 27 €

EKZAMENOJ


- Mi aliĝas kaj pagos surloke Atesto pri lernado
- Atesto pri supera lernado Parola parto de Kapableco

Mi sendas ĉekon laŭ la jena sumo, kun mia aliĝilo.
Bonvolu noti, ke via aliĝo validos nur post ricevo de via pago.

Dato :

Subskribo :

KIEL ATINGI LA ROQUE D'ANTHERON ?



◆ Velurante sur la autoŝoseo A7, Elirejo « Senas » - Veturu laŭ la RN 7 en la direkto « Aix-en-Provence ». Ĉe la golliejo « Pont Royal », turniĝi maldekstren kaj veturi sur la D561 ĝis La Roque d'Anthon.

◆ Velurante sur la autoŝoseo A 51 Elirejo « Pertuis ». Veturu 2 km laŭ la D 956 en la direkto Aix-en-Provence kaj turniĝi dekstren en la direkto Le Puy-Sainte-Reparate (D561). Daurigi laŭ tiu vojo ĝis La Roque

La Roque d'Anthon ankaŭ estas atingebla per (maloftaj) aŭtobusoj el Marseille tra Aix-en-Pce (horaroj sendolaj laŭ petoj)

TGV stacidomo « Aix-en-Provence TGV ». Merkrede kaj TGV ⇨ La Roque d'Anthon kaj dimanĉe kaj lunde La Roque d'Anthon ⇨ Aix TGV

Flughaveno Marseille Provence en Marignane. Regula aŭtobuso Marseille-Provence / Aix-en-Provence haltas survoje en « Aix TGV » stacidomo. Tiamaniere eblas uzi la transportadon kiun ni aranĝos el la TGV-stacidomo.

EN LA ROQUE D'ANTHERON... Inter la vilaĝo kaj la feriejo La Baume, eblas paŝi dum 2 kilometroj. Ni lamen aranĝos transportadon senpagan per aŭto kaj aŭtobuseto.

LOGĀDO

Oni proponas grandan diversecon. Ni zorgas nur pri la rezervado en la feriejo La Baume. Se vi elektas alian lorgeblecon, vi mem devas rezervi.

◆ La Feriejo La Baume - Ĝi konsistas el dometoj por kvar / kvin personoj, kun du ĉambroj kiuj enhavas du unupersonajn litojn, mangoĉambro, kuirrejo ekipita, duŝejo, necesejo. Vi povas mendi la tutan domon, unu ĉambro aŭ unu liton.

◆ **Hotelo Le Mas de Jossyl 2*** en la Roque d'Anthon (« Logis de France ») ☎ 04 42 50 71 00 jossyl.mas@wanadoo.fr www.masedejossyl.fr

◆ **Du Tendumejoj 3*** en La Roque d'Anthon, kie eblas tendumi aŭ luj « mobil-home ». Le Domaine des Iscles ☎ 04 42 50 44 25 - Le Silvaccane ☎ 04 42 50 40 54. Samaj retadresoj : campclub@wanadoo.fr www.campclub.com

◆ **Multaj ĉambroj ĉe privataĵoj** - Bonvolu kontakti la turismoficejon ☎ 04 42 50 70 74 orn:la.roque@wanadoo.fr www.ville-la-roque-d-anthon.fr



PROVIZORA PROGRAMO

	matene	postagmeze	vespere
merkredon la 19-an		Akcepto de la partoprenantoj en La Baume (Preleĝoj (**))	Folkloro vespero
ĵaŭdon La 20-an	Aktivulaj laborgrupoj : varbado, eksteraj rilatoj, interasocia kunlaboro, surloka informado, instruado de esperanto...	Preleĝo « La Valdanoj » Vizito de la muzeo en La Roque	Akcepto en la urbedomo Honora aperitivo
vendredon la 21-an	Ekzamenoj (*) Tutaga ekskurso en Marseille (Ekzamenoj (**))	Oficialaj kunvenoj de diversaj asocioj : GEE, JEFO, FEI, FKEA...	Koncerto kun Jomo Bankedo Balo
sabaton la 22-an	Kunsido UFE Vizito de la vilaĝo	Membrokunveno de Esperanto-France Komitatkunsido de UFE	Teatra vespero
dimanĉon la 23-an	Komitatkunsido de UFE Pieda promenado en arbaro apud La Roque	Ekскурso al Aix-en-Provence	Vespero de la talentuloj
lundon la 24-an	Ekскурso al Avignon		

(*) Pri la ekzamenoj : eblas trapasi la Ateston pri lernado. Superan Ateston pri lernado, la parololan parton de la Kapableco. Nepe antaŭe enskribiĝu !

(**) Pri la preleĝoj : sinpropoj por mallongaj (15 minutaj) preleĝoj bonvenas.

MANĜOJ

La personoj kiuj loĝos en la dometoj de la fericentro povos mem kuir... sed ankaŭ manĝi matene, tagmeze kaj vespere en la restoracio de La Baume. La kongresanoj kiuj loĝos aliloke rajtos manĝi en La Baume (ne matemanĝi), se ili antaŭmendis aliĝante al la kongreso. La prezoj estas la jenaj :
Matemanĝo : 4 € - **Tagmanĝo aŭ vespermanĝo** : 11 € (13 € se vi ne loĝas en La Baume)

Bonvolu noti ke la tagmanĝo de la 19-a dependos de la nombro de aliĝintoj.

Kompreneble, vi ankaŭ rajtas tagmanĝi aŭ vespermanĝi en restoracioj en la vilaĝo La Roque d'Anthon... Pri tio, vi mem devas zorgi.





----- <http://boulogne2005.online.fr> -----

Kadre de la internacia amikeca renkontiĝo Boulogne 2005, vi de nun, havas la eblecon ret-viziti la urbon kaj ekkoni ĝiajn riĉaĵojn kaj ĉarmojn... Tiucele foliumu la ret-paĝon

<http://boulogne2005.online.fr/eo/bulonjo>

Krome, enhavoriĉa fako pri la historio, pri la Kongreso de 1905 atendas vin en la TTT-ejo... (*Paroladoj, raportoj, deklarioj... kaj eĉ vi povos prikanti la Kongreson ! Ni anticipe donacas al vi la parolojn de la aludita kanto !*)...

<http://boulogne2005.online.fr/eo/historio>

Fine, speciala retpaĝo pri reklamado nun legeblas en la TTT-ejo

<http://boulogne2005.online.fr/eo/reklamo.htm>



grupa foto de la Konkresanoj de 1905, antaŭ la Kazino de Bulonjo-ĉe-Maró.
L.L. Zamenhof kaj lia edzino sidas meze sur la unua vico



KONGRESA TAG'
de Ch. W. T. REEVE


(Ario : «*Funiculi Funicula*» de L. Denza)

L ĈIU LANDO venu al Bulonjo
Pretigu vin, pretigu vin.
Doktoro Zamenhofo kaj Kongreso
Atendas vin, atendas vin.
Alportu Esperantan langon veran
Por la kunven', por la kunven'.
Forlasu hejme propran lingvon vian
Sen ia ĝen', sen ia ĝen'.
Koruso.

La kara lingvo jam tre dolĉa estas
Por skriba l' art', por skriba l' art.
Sed veran plezuregon al ni donas
La parolart', la parolart'.
Nun ĉiu lando kantu unulingve,
En granda ĥor', en granda ĥor'.
Eisonu voĉoj laŭte kaj pli laŭte,
Ĝis ĉies kor', ĝis ĉies kor'.
Koruso.

**Ni kunvenu por kongresa tag'
En Bulonjon sub la verda flag'.
Malpaco ja ne daŭru plu ;
Ne estas ni fremduloj plu ;
Esperanta frato estas ne fremdulo plu.**





Kosmoŝipo Ŝenzhou-5 sukcese revenis ☆☆☆☆



Je 6:23 de la 16-a de oktobro laŭ pekina tempo, la kosmoŝipo **Ŝenzhou-5** sukcese surteriĝis en loko de Interna Mongolio, 4.8 km for de la difinita celo. Post surteriĝo de la kosmoŝipo, **Yang Liwei**, la kosmonaŭto de Ŝenzhou-5, eliris sana el la kosmoŝipo. Tio signifas, ke la homporta kosmoŝipo sukcese plenumis sian laboron.

La kosmoŝipo Ŝenzhou-5 ĉirkaŭflugis la teron 14 fojojn en 21 horoj. Lu Jie, usona kosmonaŭto de ĉina deveno, en la spaco salutis Yang Liwei: "*Bonvenon al la spaco!*" "*Bonan vojaĝon kaj sukceson!*" Kaj rusa kosmonaŭto diris: "*Mi tre ĝojas, ke en la spaco troviĝas ankaŭ plia kosmonaŭto krom mi kaj Lu Jie. Mi scias, ke en Ĉinio estas*

la Granda Muro. Mi gratulas la Ĉinojn."

En la 15-a, **Kofi Annan**, ĝenerala sekretario de UN, pere de sia proparolanto, gratulis la sukceson de lanĉo de Ŝenzhou-5. Li diris: "*La spaco ne havas landlimon, la sukcesa lanĉo de Ŝenzhou-5 estas antaŭpaŝo de la tuta homaro al la spaco.*"

Yang Liwei, 38-jara, kosmonaŭto de la kosmoŝipo Ŝenzhou-5, estis trejnita de Ĉinio. Li estis elstara piloto de batalaviadilo kaj pilotis pli ol 1350 horojn. En la jaro 1998 li estis elektita kiel kosmonaŭto. La sukceso faris Ĉinion la 3-a lando, kiu kapablas lanĉi homportan kosmoŝipon.



89-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
24-31 julio 2004
Pekino, Ĉinio

Kongresa numero:

ĈIU ALĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON - BONVOLU TAJPI AŬ SKRIBI PRESILITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO **VIRO/VIRINO** (forstreku unu)

PERSONA(J) NOMO(J) **UEA-KODO**

ADRESO (naciinge en latinaj literoj kun poŝtkodo)

LANDO **TEL. N-RO** (kun prefikso)

PROFESIO / FAKO **FAKSO**

NASKIĜDATO **RETADRESO**

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko. (Aliĝojn sen kotizpago oni ne traktas.)

Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu (vidu dorso sube).

Mi sendas ĉi tiun aliĝilon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ suba specifo:

al ABN-Amro-konto n-ro 42.69.01.444 en la nomo de la UK (aldonante 7 eŭrojn).

al giro-konto n-ro 627337 Den Haag (aldonante 7 eŭrojn; por nederlandanoj sen kostoj).

per poŝtmandato al la adreso de la UK en Roterdamo.

per ĉeko favore al UK de Esperanto (aldonante 10 eŭrojn).

per Visa/Amex/Mastercard n-ro valida ĝis

al la poŝtĉekokonto de UEA en (Belgio 000-1631831-97;

Germanio 3182 91 509 BLZ 370 100 50 Köln; Svedio 74374-0; Svislando 12-2310-0 Bulle).

el mia UEA-konto, kie estas sufiĉa kredito (bonvolu debeti tie).

Mi ne volas ke mia adreso aperu en la Kongresa Libro.

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto:

Se vi aliĝas kiel handikapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi konsentas (forstreku unu)

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorso):

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn dorsflanke sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO	SUBSKRIBO
Por uzo de la administracio / peranto:	KOTIZO (vidu dorso)
uea-membro en kategorio/jaro	DONACO AL KONGRESO
UEA-spezfolio n-ro:	BLINDULA KASO
konfirmo de peranto:	INFANA KONGRESETO
PAGO EN CO	FONDAĴO CANUTO
KONFIRMADO	TRIAMONDA FONDAĴO
notoj	VOLONTULA FONDAĴO
	KOSTOJ (* aŭ 10 eŭroj)
	ENTUTE (en eŭroj)

ALĜILO PEKINO Informilo 29



Saluton, estimataj samideanoj,



Laŭ petoj de iuj legantoj kaj por detale konigi al vi Pekinon, ni surretigos la 9-an de septembro en nia reta EPĈ du novajn specialajn temojn: "Gvidlibro pri Pekino" (www.espero.com.cn/gvidlibro/) kaj "Antikvaj vidindaĵoj de Pekino" (www.espero.com.cn/pekinio/). La unua temas pri ĝeneralaj informoj de Pekino, vidindaj lokoj, amuzado, bongustaĵoj, butikumado ktp, kaj la dua prezentos ĉefe bildojn pri antikvaj vidindaĵoj de Pekino.

Ni planas revivigi kelkajn rubrikojn de la antaŭa papera EPĈ, ekz. originale verkitaj de legantoj, fotoj faritaj de esperantistoj ktp. Kiaj estas viaj opinioj, bonvolu montri al ni rete au letere. ***

Ĉi tie, ni petas vian kunlaboron, kun granda espero havigi de vi proponojn kaj kontribuojn. Multajn dankojn.

Kun koraj salutoj,

Redakcio de *El Popola Ĉinio*

*** El la redaktejo de *La Informilo*: niaj legantoj bonvolu "plenumi" la deziron de niaj ĉinaj samideanoj !

☆☆☆☆

La Libro "Vivo de Zamenhof" en ĉina lingvo oficiale eldoniĝis !

Por la 89-a UK en Pekino en 2004, LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio) finis kompiladon de "*Vivo de Zamenhof*" kun 299 paĝoj. Lastatempe ĝi oficiale estis eldonita de la eldonejo de Liaoning Universitato.

Vivo de Zamenhof estas redaktita de s-ro LIU Zhengkun, prezidanto de LEA, kaj s-ro SONG Yunsheng, direktoro de la konsilio de LEA. Ĝi estas la unua biografio pri Zamenhof rekte kompilita de Ĉinoj en ĉina lingvo. Tiu ĉi bindita libro celas prezenti la farojn, studan rezulton kaj ideologion de filozofio pri la tuta vivo de Zamenhof. Ĝi entute kolektas 162 bildojn aŭ fotojn pri Zamenhof. *Ĉina Esperanto-Ligo* donis siajn entuziasman gvidon kaj fortan helpon al la kompilado.

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupigo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorioj B kaj C;

B: Ĝiaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo, kaj ĉiuj landoj de Afriko kaj Latina Ameriko;

C: Ĉinio, kaj ĉiuj aliaj aziaj landoj kaj regionoj escepte de Japanio, Koreio, Honkongo, Singapuro, Israelo, Tajvano (Kategorio A) kaj Rusio (Kategorio B).

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Buleno, aŭ en la reto ĉe www.uea.org/esperanto/servoj/membriĝh/perantoj.html; ankaŭ plura aliaj informoj pri la Kongreso aperas en la UEA-paĝoj). La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2004. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. AŬ TENI LA ĈI-PAŬAJN KLARIGOJN.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en eŭroj)	ĝis 31 dec. 03 1-a periodo			ĝis 31 marto 04 2-a periodo			ekde 1 aprilo 04 3-a periodo		
	A	B	C	A	B	C	A	B	C
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	150	115	60	190	140	70	230	170	85
2. ne individua membro de UEA	190	140	70	235	175	85	280	210	105
3. komitataro/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA	75	60	30	85	70	35	115	85	45
4. kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA	115	85	45	140	105	55	170	130	65

DEFINIOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ) aŭ Mf-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). Ne temas pri Aliĝintaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).

Komitataro: Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo. Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon, kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 74 01 01 kaj 83 12 31 (inkluzive). Oni ne prete notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo ne prete postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu prete tiam per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 83 12 31;
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Buleno. La kotizo inkluzivas neman aserton. Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): "8. Kongresanoj devas fari nemon, kio kontrastas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK." Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton al la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalaĵn Kongresojn.


! Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.
Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.

La 54a Regiona Staĝo de Esperanto-France EST okazis kune kun la 24a Seminario de BAVELO en Oberkirch la 17-19-ajn de oktobro 2003.




Sub blua ĉielo kaj agrabla suno Oberkirch akceptis la partoprenantojn de tiu staĝo en la komforta eklezia domo Marienfried. Venis proksimume 80 personoj kaj infanoj el Germanio, Francio kaj Nederlando.

La programo komenciĝis jam vendrede vespere. Per tre simpatia interkona rondo. Ursula Niesert akceptis la partoprenantojn kaj sukcesis krei amikan etoson..




Esperanto
bona ideo!




Sabate matene komenciĝis la prelegoj de la bukeda kurso. Josef Schiffer sukcesis starigi en sia urbo Villigen novan kurson Esperanto-anglan por german-lingvanoj, per kiu la homoj pli bone lernas la anglan dank'al lernado de Esperanto. Vizitas la kurson pli ol 20 gelerntantoj. Iuj lernas nur Esperanton, sed neniu povas lerni nur la anglan.

Janek Bender sukcesis starigi Esperanto-kurson en sia firmao Bosch, en la kadro de interna edukado al ties laborantoj. La kurso estas menciita en la koncerna libro de la firmao.




Sabate posttagmeze okazis la vizito al la ĉarma urbo Oberkirch. Kiel planite en la programo bela vetero agrabligis nian migradon, kiun lerte gvidis Heiss Hermann. Jen ni renkontis diversajn formojn..



Pliaj fotoj pri tiu aranĝo videblaj ĉe: <http://mulhouse.esperanto.free.fr>




Konrad Gremelspacher prelegis pri Esperanto-elsendojn, kiujn li regule prizorgas dufoje monate ĉe loka radio-stacio dreyeckland en Freiburg.



Ĉiun duan kaj kvaran lundon de monato aŭdeblas Esperanto-programo de la 16a ĝis la 17a horo :
Triangulujo - das Esperanto-Magazin

Migradi de nordo de Germanio ĝis la suda Konstanca lago, farante pli ol 1200 km piede. Jen nekutima maniero por malkovri sian propran landon. Tion realigis Dorothea (Dodo) Hüfler en 2 monatoj kaj duono. Samokaze ŝi informis al ĵurnalistoj pri la kreado de lernejo en Benina vilaĝo, por kiu ŝi sukcesis kolekti monon. Ŝi rakontis al ni pri sia migrado kaj pri kelkaj anekdotoj, kiujn ŝi spertis dum tiu nekutima vojaĝo.



<http://www.aliaflanko.de> estas la tre interesa kaj alloga reĵejo de BAVELO. Ĝin prizorgas Robert Bogenschneider kaj Karin Weirich, kiu prelegis pri ĝi dimanĉe matene.

François-Xavier GILBERT informas pri la venonta staĝo, kiu okazos en Verdun la 26-28ajn de marto 2004. Ĝi refoje estos komuna aranĝo de Esperanto France-Est kaj de BAVELO. En Verdun troviĝas La Monda Centro de Paco.

Thierry Saladin el Montpellier prezentas al la ĉeestantoj la novajn glubendojn, kiujn kreis la asocio "Réinsertion et Espéranto". Ili estas haveblaj en la lingvoj de la eŭro-landoj kaj en Esperanto. Kontakto: <http://europesperanto.multimania.com>



... Pluaj eroj ĉerpitaj el la paralela raporto de Karin Weirich ...

“Ĉu la seminario estis malbona? Ĉu enviiga? Tute ne!! Sed se vi ĉeestintus, vi konsentus al mi: eĉ la plej agrabla seminario, la plej interesaj prelegoj, la plej bonaj manĝaĵoj, la plej harmoniplena kunestado ne povintus superi la sunbrilon dum tiuj aŭtunaj tagoj. Kaj ankaŭ la bela pejzaĝo, la vitoj, kiuj kreskas rekte antaŭ la fenestroj de la manĝejo, la jam multkoloraj koloriĝitaj folioj de la arboj ĝojigis la seminarianojn.

(.../...) Post la vespermanĝo la seminario oficiale komenciĝis per la unuaj partoj de la kursoj. Bedaŭrinde pluraj de la kursgvidantoj ne jam ĉeestis, kaj kelkaj kursoj ne povis okazi vendredon vespere. Ankaŭ la preleganto por la bukeda kurso - kiun mi partoprenis - mankis, do pastro *Kronenberger* proponis kanti vesperajn kantojn el "Adoru". Poste je la naŭa komencis la interkonatiga vespero, sed tiun mi ne partoprenis. Anstataŭe mi troviĝis en vigla babilado kun agrabla kompanio kaj botelo da biero en (aŭ ekster - pro cigaredo) la halo, salutis aliajn preterirantojn, kiuj restis kun ni por kelkaj minutoj kaj ĝuis la vesperon.

(.../...) Je la unua kaj duono post la tagmanĝo *Hermann HeiB* gvidis grupon de la seminarianoj tra sia hejmurbo *Oberkirch*. Ni malsuprengrimpis la monteton, iris laŭ la rivero *Rench* kaj tiel atingis la urbocentron de *Oberkirch*. Sinjoro *HeiB* montris la ni la plej belajn angulojn kun trabfakaj domoj, parte rekte konstruitaj sur la malnova urbomuro, ni rigardis la montrofenestrojn de lignoskulptistoj kaj brandofaristoj (*Oberkirch* estas centro de la nigra-arbara brandofarado) kaj promenis tra la granda bela urboparko. Estis agrablaj horoj, kaj reveninte al la kongresejo kafo kaj kuko jam atendis nin.

(.../...) Ĉar dimanĉon matene estas mia vico prelegi kaj prezenti mian retejon "aliaflanko.de", mi jam estis iomete nervoza kaj decidis enlitiĝi ne tro malfrue, kaj je noktomezo mi deziris bonan nokton al ĉiuj drinkemuloj, kiuj ankoraŭ daŭrigis la babiladon en la manĝejo. Post la dimanĉa matenmanĝo mi ekfunkciigis mian komputilon, kaj montris al la intereseuloj ĉiujn partojn de la retejo, klarigis, kiel oni povas mem aldoni materialon por la parto "urbo", kiel oni povas anonci siajn aranĝojn por la kalendaro, kiel oni povas sendi senkostajn bildkartojn al amikoj ktp. Mi tre dankas al *Robert*, kiu multe helpis al mi, ĉiam, kiam mi sentis mian kapon tute malplena kaj ne plu sciis iun ajn vorton de Esperanto. Li ankaŭ kompletigis miajn klarigojn, kie mi preterlasis gravajn informojn.

Bedaŭrinde nun la seminario jam alproksimiĝis al sia finiĝo. Restis nur la lasta komuna tagmanĝo, kaj tuj poste mi veturis hejmen. Mi jam antaŭĝojas la venontan renkontiĝon printempe en *Verdun*.

Restas ankoraŭ mencii kelkajn faktojn: La seminarion partoprenis 68 personoj, inter ili 26 Francoj. Okazis kurso por komencantoj, la paroliga kurso, la "bukeda" kurso kaj infankurso. La libroservojn bone prizorgis *Jean-Luc Thibias*, dankon pro tio. Videblis foto-ekspozicio pri la pasintaj tri kunvenoj, kunmetita de *Robert* kaj mi. Finfine mi supozas ke mi rajtas paroli por ĉiuj ĉeestintoj, se mi diras dankon al ĉiuj organizintoj kaj aparte al *Maria Schiffer*, kiu zorgis pri la financoj kaj ĉiutage deĵoris ĉe la akceptejo... ”.

Karin Weirich

PS – Ni memevidente dediĉas specifan dankon al Ursula Niesert, kiu prizorgis akurate kaj daŭre la bonan disvolviĝon de la evento... kaj kiu amike salutis la forirantajn partoprenantojn, spite al lasthora malagrablaĵo... Necesis ja gipsigo de la maldekstra brako post neoportuna piedglito !... Feliĉe, kiam vi legos tiujn liniojn, ŝi ĝuintos uzon de ambaŭ brakoj !...



OSIEK-PREMIO 2003

En 2003 la OSIEK-anoj proponis 25 verkajojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de *La Gazeto*. La 24an de julio, dum la IEK en Prago, Ĉeĥa Respubliko, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Gerrit BERVELING

pro:

Antologio Latina

Gratulon!

La premio, 500 eŭr., rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkaĵo ne ficcia aŭ pro grava traduklaboro.

el *Fonto* n-ro 268, aprilo 2003

informoj: *La Gazeto*, 55210 Creuĉ, Francio kaj <http://osiek.org>

Ĵaŭdo
6
novembro
15:17 h

aliaflanko
<http://www.aliaflanko.de>

Vizitoj
ekde 01.11.02
3811

Aliaflanko estas tre interesa retejo de BAVELO lerte prizorgita de Robert Bogenschneider kaj de Karin Weirich. Jen kelkaj proponoj faritaj al la vizitantoj.

urboj	Esperantlingvaj urbo-informiloj kaj -gvidiloj kun la ebleco, mem aldoni novajn ligojn
fotoj	Fotoj de Esperanto-aranĝoj naciaj aŭ internaciaj
frenezejo	Frenezajtoj: Serĉoj, humuraj rakontoj, sed ankaŭ vortaro esperanto-germana
deutsch	Germanlingva parto: Tekstoj pri Esperanto, rakontoj, aforismoj
BAVELO	Fotoj kaj raportoj pri Esperanto-aranĝoj de aŭ kun partopreno de BAVELO, ĝeneralaj informoj pri BAVELO; aranĝo-kalendaro
Esperanto Konstanz	Dulingva paĝaro de la Konstanca esperanto-grupo: Informoj pri renkontiĝoj, kursoj, ligoj, ktp.
cerbumejo	Matematikaj kaj logikaj enigmoj, diskutejo pri nesolvitaj ĉiutagaj problemetoj, aforismoj
salutkartoj	Sendu senkoston salutkarton per la reto.
Latvio	Hejmpaĝo "Esperanto en Latvio"



Jara asembleo
2003
Villingen
07.04.2003

Orientfranca
staĝo
Hennezel, 11.-
13.04.2003



20-a BAVELO-
Tago
Konstanz 26.-
28.4.2002

24-a BAVELO-
Seminario
Rastatt 28.-
30.9.2001



30-a BAVELO-
Migrado
Blaubeuren
09.06.2002

Orientfranca
staĝo
Nancy, 18.-
20.10.2002



Pri BAVELO

■ Kio estas BAVELO?

■ Statuto

■ Paĝo pri Esperanto en
"Sindelfinger Zeitung" de
13.08.2003

Aranĝoj

Kontribuoj

Wilhelm Hauff: La malvarma koro
"La fiŝistino de la Konstanca lago"

"En Heidelberg mi perdis mian
koron"

Johano M./SAT-Amikaro: 9-11-01

Invitilo kaj
aliĝilo al:

**55-a regiona staĝo de *Espéranto France-Est*: 26.-
28.03.2004 en Verdun**

Deutsche Version

Fotoj de BAVELO-Aranĝoj


*Klako sur malgrandaj fotoj plej ofte montras pli grandan bildon en
propra kadro; klarigeto per restado de la muso sur bildo.
F signifas fotojn, R raporton.*

26-a BAVELO-Seminario F R Oberkirch, 17.-
kune kun 54-a Regiona staĝo / BAVELido 19.10.03

31-a kunveno de la Esperantogrupo Konstanz F Konstanz, 07.09.03

33-a BAVELO-Migrado F Bad Wildbad,
31.08.03

Komuna ekskurso de la grupoj en Freiburg kaj F Breisach, 21.06.03
Gerardmer al Kaiserstuhl



R E A G O J

... Ni ne blufu ! ...

Delonge ĉiu serioza aktiva esperantisto scias, ke la priparolitaj *milionoj da esperantoparolantoj* ekzistas nur en fanfaronaj artikoloj, sed malgraŭ ĉiuj atentigoj pri la danĝero de tiaj falsaj asertoj tiuj asertoj bedaŭrinde de tempo al tempo reaperas. Estas same kun aliaj pasiaj asertoj pri lingvoj, kaj tio konfirmas la fakton, ke kelkaj intervenantoj bedaŭrinde tute ne konsideris la antaŭajn debatojn aŭ forumojn: se ili studus ilin, ili certe evitus novajn diskutojn aŭ disputojn tute malutilajn je nia komuna afero.

Kial ne paroli pli modeste kaj pli reale pri centoj da miloj de esperantistoj sen pli da precizeco (t.e. minimume 200 000), *kiuj nun flue uzas la lingvon*. Kaj se iu parolas al ni pri milionoj da esperantistoj, estus bone aldoni, ke estas neeble precize nombri ilin, kaj ke ni povas konsenti pri tiu nombro NUR se oni konsideras la nombron de tiuj, kiuj flue kaj aktive parolis Esperanton TRA LA JARCENTO, de ĝia apero ĝis nun !

Tiam ni estos pli kredindaj, kiam ni asertos, ke la oficialaj statistikoj pri la uzo de la angla lingvo estas tute same fanfaronaj, ĉar ili rezultas de subjektiva *memevaluado*. Tiel oni povas legi laŭ la fontoj, ke 20%, 40% aŭ eĉ 60% de la franca loĝantaro scipovas paroli angle! Kiu havas sperton pri ĝemeligo de anglaj kaj francaj urboj evidente scias, ke *tio estas pura blufu*. Kiam la enketo estas farita de serioza faka entrepreno por mezuri la komprenon de la angla en

Eŭropo, oni ricevas pli modestan ciferojn. En longa interesa artikolo de Barbara Wallraff en la usona revuo THE ATLANTIC de nov.2000 : <http://www.theatlantic.com/issues/2000/11/wallraff.htm>, oni legas, ke la entrepreno *Lintas*, kiu science faris tiun enketon deziris kontroli, ĉu la ciferoj donitaj de "Eurobarometer" estis fidindaj. En ili oni asertis, ke 77% de Danoj kaj 75% de Svedoj povas konversacii en la angla, same kiel preskaŭ 33% de la 13 neangloparolantaj landoj de Eŭropo.!



La enketo de *Lintas*, kiu proponis al la enketitoj unue evalui sian lingvokapablon kaj due traduki seriojn de anglaj frazoj, konkludis, ke en landoj kiel Francio, Italio kaj Hispanio *malpli ol 3% regis la anglan*, kaj ke nur en malgrandaj merkatoj kiel Skandinavio kaj Nederlando la proporcio superis 10%. Senkuraĝigaj rezultoj por la enketistoj. Kaj ĉiu el ni scias, ke ankoraŭ malpli el tiuj nedenskaj angloparolantoj vere kapablas perfekte regi aktive la anglan, malgraŭ ĝia fakte oficiala instruado jam de pluraj jardekoj en multaj eŭropaj lingvoj.

Se ni komparas la rezultojn atingitajn de Esperanto sen oficiala instruado, sen oficiala helpo kaj eĉ malgraŭ multaj malhelpoj, ni ne havas kialon honti pri niaj modestaj nombroj kaj pri la kvalito de nia komunikado. Imagu la rezultojn atingeblajn, se la esperanto movado ĝuus centonon de la rimedoj konsentitaj al instruado de la angla lingvo !...

Maurice SUJET

... Ĉu frenezaj tiuj, kiuj skeptikas pri la "ĉiea, senproblema uzado" de la angla lingvo ?...

"... Do mi estas inter tiuj frenezuloj. Mi jam uzis multajn TTT-ejojn pri hoteloj tra la mondo, sed la informoj, kiujn havigis al mi lokano (UEA-delegito) pri plej taŭga situo kaj aliaj similaj informoj [foje eĉ propono pri loĝigo] estis multe pli gravaj.

Cetere estas realo, ke NE ĈIU interesa, kapabla, klera homo en la mondo scipovas (aŭ emas paroli) la anglan, malgraŭ viaj revoj !

Mi konas dekojn kaj dekojn da ekzemploj, kaj mi laboras en scienca instituto, kie principe plej multaj scipovus la anglan en flua nivelo. Trompaĵo!

Mi jam uzis ĝin sufiĉe multe, sed la solaj vizititaj landoj en kiuj mi havis interesajn babiladojn en la angla estis. . . Britio kaj Usono !. Spertoj povas varii, sed en la aliaj landoj, aŭ loka lingvo aŭ Esperanto lasis al mi multe pli da bonaj memoroj pri la homoj.

Amike..."

James

“...La anglan lingvon kaj Anglalingvujon mi estimas kaj respektas. Tamen min agacas la lingva ordo nun reganta. Ĝi estas maljusta ekonomie, maljusta kulture kaj maljusta socie. Ĝuste kontraŭ tia ĉeno da maljustaĵoj mi voĉis kaj ĉiam voĉos – ne kontraŭ la angla, ne kontraŭ Britio, ne kontraŭ Usono, ne kontraŭ iu alia teritorio de Anglalingvujoj.

Kaj cetere, malestimi la anglan rajtas neniu esperantisto – eĉ se nur mezklera. Sen la kontribuo de la angla, esperanto nun aspektus tute alie, aŭ eble jam estus longe mortinta. Zamenhof tion klare asertis: entuziasme ĉirkaŭiki kaj draste redukti la grandegulan gramatikon de sia zorge provata kaj longe ellaborata internacia lingvo li komencis nur post koniĝo kun la senbalasteco de la angla gramatiko, skandale kontrasta kun la labirintaj gramatikoj rusa, pola, germana, hebrea, latina, greka kaj franca, kiujn li ĝis tiam profunde studis kaj esploris. En la vejnoj de esperanto fluas do la genio de la angla kaj usona civilizacioj: malami ĉi lastajn signifas malami esperanton kaj malŝati la ideon mem de civilizacio.

En Anglalingvujoj okazis du ŝlosilaj UK-oj. En 1907 la fama “*trio por la tria*” – Pollen, Cunningham kaj Bolingbroke Mudie – sukcese aranĝis en Kembriĝo la trian *Universalan Kongreson*, dum kiu Zamenhof faris gravan kaj ĉiam relegindan paroladon. Tri jarojn poste, en 1910, okazis en Vaŝingtono la unua ekstereŭropa UK. Ankaŭ tie Zamenhof eldiris paroladon, ĉi-foje pli mallongan, sed simbole signifan. Jen ĝia komenco:

...“*Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando, pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas! Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu au alia gento au eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.*”...

Anglalingvujoj kaj esperanto ĉiam kunamblis. En Anglalingvujoj enmondiĝis la plej elstara esperanta poeto -*William Auld*- kaj la plej eminenta esperanta poetino -*Marjorie Boulton*- se ne paroli pri tuta plejado da plurfake gravaj esperantistoj tie naskitaj kaj tie fekunde laborintaj au laborantaj: Mayor, Collinson, Butler, Downes, Bailey, Dinwoodie, Neüell, Venture, Rosetti, Francis, Broadribb, Harlow, Wells, Tonkin, Gubbins, Steele, Fettes, Grimley Evans, inter multaj aliaj.

Anglalingvujoj ĉiam estis kaj restos grava kolono de Esperantujo. La angla gramatike cementis nian lingvon kaj ĝin leksike nutris kaj plu nutras. Mia artikolo ne tembris kontraŭangle, sed nur kontraŭanglisme... ”

Goncalo Neves


NB (el la redaktorejo de “ La Informilo ”) : Teksto ĉerpita el “ *persona forumo de Goncalo Neves* ”, al reago de iu sinjoro Y.L., kiu “flaris kontraŭanglan tonon” en ia antaŭa artikolo....

(rubriko “ *periskope* ” - portalo “ *Ĝangalo* ” - www.gxangalo.com)



...Do you speak english?... Sprechen Sie deutsch?...Parla italiano?...Parlez-vous français?... Speekt u nederlands?... Hablan español?... Falam portugueses?

Karaj geamikoj,




Antaŭ kelkaj tagoj, mi ĉeestis mondkongreson “*Apimondia*” pri abelbredado en Slovenio. Kiel esperantisto mi evidente estis tre sentema al diverstipaj manifestacioj de lingva discriminacio. Laŭmemore -mi estas eksterhejme kaj ne havas dokumentojn ĉemane- la oficialaj lingvoj estis: la angla, la franca, la germana, la hispana kaj eble ankaŭ la slovena.

El kvar prelegejoj nur du estis ekipitaj per samtempa traduksistemo.

Dum la unuaj tagoj mi aŭdis nur prelegantojn “sin esprimantaj” per la angla. La demandoj same en la angla kio kelkfoje evidentigis **la malbonan regadon de la parola angla lingvo de**

la preleganto, kiu ne aperis dum la strikta legado de la skriba teksto.

La paroksismo de la discriminacio okazis, kiam juna sciencisto el Meksiko intencis paroli en la hispana -kvankam lia skriba projekciita prezentado estis en la angla- kaj la germana moderanto insistis, por ke li parolu en la angla. La meksikano ĝenita, senkulpigis sin hispane antaŭ siaj samlingvanoj, kaj **pene legis angle** la tekston projekciitan.



Kiam okazis demandoj, li tre malfacile kapablis respondi angle sed kuraĝe provis. Finfine kelkaj kuraĝuloj demandis al li hispane, kio senpezigis la suferojn de la junulo. La sekvantan tagon, franca preleganto parolis nur France, kaj strange, multaj demandantoj, eĉ ne franclingvanoj, demandis france ! Evidente aperis novaj demandantoj, kiuj ne estis inter la ĝistiamaj demandintoj.

Same, germana “moderanto” parolis nur germane poste.

Pluraj prelegantoj, kiuj fiere alfrontis la defion esprimi sin en la angla, **estis ne kompreneblaj de la aŭkultantaro**, eĉ de denaskaj angloparolantoj **kiel mia edzino**, kvankam ŝi konis la temon kaj la teknikan vortprovizon. Konklude, perverse agas iu antaŭjuĝo favora al la angla, kaj se neniu aŭdacas rompi la psikan premon organizatan ne nur -ofte senkonscie- de anglalingvanoj, sed ankaŭ de kelkaj sciencistoj -ne denaskaj angloparolantoj-, kiuj prave / neprave konsideras, ke ili bone regas la anglan kaj volas trudi ĝin al la aliaj, eĉ kiam ekzistas la ebleco, ke kelkaj privilegiuloj - de nur 4 lingvoj krom la angla- parolu sian denaskan lingvon.

Kvankam ni ne havas samajn problemojn, mi pensas, ke pro nia sentemo al lingva diskriminacio, estus bone, ke ni esperantistoj -multaj inter ni jam spertis similajn situaciojn okaze de internaciaj renkontiĝoj en Babelio- cerbumu pri la manieroj laŭ kiuj eblus mildigi la lingvan diskriminacion.

Ekzemple:

- se en la *kongreslibro* aperus la lingvoj sciataj de la prelegantoj, ĉiu pli volonte uzus aliajn lingvojn ol la anglan, kiu estas antaŭjuĝe uzata "*par défaut*"-pardonu francismon, mi ne scias kiel traduki tiun teknikan esprimon- -Se estus klare indikita, ke se la skriba projekciita prezentado estas en la angla, ĉiu rajtas paroli en sia denaska lingvo.

Mi opinias, ke proponaro de tiaj reguloj devus esti prezentitaj al "*asocio de kongresorganizantoj*" aŭ simila strukturo, en kiu Nikola Rašić membriĝis, paralele aŭ aldone al la solvo Esperanto, montrante tiel, ke nia celo estas antaŭ ĉio plibonigi la homan interkompreniĝon, ne nepre kaj nure trudante esperanton.

Mi ankaŭ sugestas, ke UEA aŭ TEJO ŝerĉu financfontojn por pristudigi la lingvajn diskriminaciojn -ofte tre subtilajn kaj kelkfoje perversajn- kiuj montriĝas okaze de internaciaj renkontiĝoj. (ekzemple detale pristudi la lingvajn devenojn de la demandantoj, de la prelegantoj kaj la proporcioj de la lingvoj reale uzataj. . .)

Estus ankaŭ celtrafe disponi pri efika informilo pri esperanto celanta kongresorganizantojn, kiun UEA povus disponigi al surlokaj aktivuloj eventuale informitaj pri kongresoj, pri kiuj ili eĉ ne estis informitaj, por ke ili sufiĉe frue konsciigu la LKKojn pri lingva diskriminacio. Samtempa desupra kaj desuba agado pli efikas.

Amike kaj dankon pro via pacienco -scienco de la paco!- por legi tiun longan mesaĝon.

Philippe Chavignon



ESPERANTO EN FRANCO KONGRESO 2004



La Roque d'Anthéron
de la 19-a ĝis la 24-a de majo



La kongreso okazos en Provenco, 30 kilometrojn norde de Aix-en-Provence, en vilaĝo La Roque d'Anthéron, en la valo de la rivero Durance. Ĝi estas historia centro de la Valdanoj (les Vaudois) kaj estas konata pro sia Internacia Festivalo de Piano, unu el la plej famaj festivaloj en suda Francio, kaj ankaŭ pro la cistercia abatejo Silvacane.

Vi povos alveni antaŭ la kongreso kaj resti pli longe por ripozi aŭ promeni... La turisma allogaĵoj estas multnombraj en ĉi-tiu regiono (Luberon, Verdon kaj Camargue naturaj parkoj, mediteranea marbordo, artaj kaj historiaj urboj kiel Aix-en-Provence, Marseille, Avignon, Arles, ĉarmaj provencaj vilaĝoj, ktp...)

Aktivaj esperantistoj partoprenos diversajn oficialajn kunsidojn ĉar kunkongresos UFE, GEE, JEFO, FET, FKEA kaj espereble aliaj.

La kultura programo estos aparte riĉa : folkloro vespero, koncerto de la fama kantisto JoMo, teatra vespero, vespero de la talentuloj, ekspozicio kaj diversaj prelegetoj. Ankaŭ viaj akompanantoj ĝuos apartan programon : vizito de la vilaĝo, de la diversaj muzeoj, piedekskurso en la apudaj montetoj, ne parolante pri vizito de Marseille, Aix kaj Avignon.

Venu kaj ĝuu internacian kaj provencan etoson, riĉonplenajn kulturajn vizitojn, aktivulajn kunsidojn, fruktodonajn interŝanĝojn.

programo kaj aliĝilo
en ĉi tiu bulteno



*Emfazu pri nia propra kulturo!
Inter diversaj rimedoj, montru al la skeptikuloj
la novan libron en esperanto,
kiun vi metis sur vian libro-breton!*

El nia libroservo

Informoj



- ⇒ Pro translokiĝado de la libroservo, nia kutima rubriko ne aperis en la lasta informilo Ni pardonpetas niajn legantojn.
- ⇒ La libroservo partoprenis la semajnfinan renkontiĝon organizitan de Bavelo en Oberkirch Korajn dankojn al niaj akceptintoj.
- ⇒ Nia venonta rendezuo estos en Verdun dum la venonta printempa regiona staĝo.



Resumoj, recenzoj, opinioj...

⇒ Ĉiu leginto kiu deziras recenzi, preparoli, opinii pri legita libro povas sendi al mi (je la adreso de la libroservo) kelklinian tekston por ke ĝi aperu en tiu rubriko en venonta informilo.



TILLA (Spomenka Štimec) Edistudio 12,00 €

Komence ion necesas konfesi : post legado de kelkaj dekoj da paĝoj -kaj maĝraŭ la fakto, ke la ĉefa figuro de la rakonto havis sufiĉe proksimajn rilatojn kun famaj artistoj de la komenco de la 20-a jarcento- mi ne trovis eksterordinaran interesiĝon ! Eble instigis min al plulegado la mencio de Esperantaĵo : la juna komizo de presejo, kiu vane prizorgis afiŝojn pri la Universala Kongreso en Parizo ne okazinta pro la ekmilitado en 1914. Ĉu tiu fama germanlingva aktorino Tilla DURIEUX iel gravis en la movado ? Ja pluroke en la sekvo iel aperas rilateto kun Esperanto, sed kedu min, ne plu nur pro tio ekkaptis min entuziasmo kaj emo finlegi senhalte ! Ege atentokapta estas ŝia fuĝo kun sia tiama juda edzo antaŭ la nazia minaco ĝis la rifuĝo en Zagrebo, la danĝera helpo al partizanoj dum la ustaŝa reĝimo, la postmilita pluvivado kiel kudristino por vestoj de pupteatro kaj fine tamena retrovo de kelktempa aktorina famo ! Miaopinie, jen denova majstroverko de Spomenka Štimec.



tilla
Spomenka Štimec



UNE LANGUE POUR L'EUROPE ?

Mais oui !

pour sauver les langues de l'Europe ...

André CHERPILLOD Editions La Blanchetière 4,50 eŭroj (+ sendokostoj 1.40 eŭroj, per nia libroservo)

Kiam la leterportisto enmanigis al mi la menditan libreton, mi eksidis kaj eklegis. Mi ekstariĝis post la finlegado ! Sciinte ke la verkisto estas André CHERPILLOD mi ja certis, ke temos pri seriozaĵo, sed aldoniĝis la fakto, ke de kelka tempo mi serĉis franclingvan argumentaron pri Esperanto, kiu ne tro longas, sed tamen sufiĉe kompletas por trafe konvinki. Tiam majstroverkon produktis André CHERPILLOD. Ĉu ne indus ĝin plej vaste diskonigi ?

Edmond LUDWIG

Por mendi librojn:



1. Vi sendas vian mendon
 - per poŝto (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan mendilon)
 - per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendokostoj)
3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97
BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo»



Nove alvenintaj libroj



La postdomo, satira romano, 90 p, Istvan Ertl *Bero*. Kiu mortigis Mijneer Fonteyn sub Verkeerdekeelgatschietbaanlaan 66 ?

La Zamenhof-stato, interparolado, 292 p, **Dobrzynski, Varpas**. 18,00 €. Roman Dobrzynski demandadas la nepon de Ludoviko Zamenhof pri lia vivo, la esperanto-movado kaj diversaj aliaj temoj.



Bazaj nocioj en kemio kaj kemiaj kalkuli-problemoj Scienco, 58 p **ŝvarc Westermayer**, 5,00 € Serioza kajero por kemilemantoj : kurso pri la scienco, problemoj kaj iliaj solvoj



Vere aŭ fantazie Noveloj, 242p **Claude Piron**, **Fonto 13,50€**
Reeldono de jam konata verko pri ne kredeblaj rakontoj




Universala deklaro pri la lingvaj rajtoj - 36p, *Kooperativo de Literatura Foiro* 8,00 €

Traduko de deklaro subskribita de institucioj kaj neregistaraj organizaĵoj en Barcelono la 6an de junio 1996

Por lerni esperanton el la germana (aŭ inverse!)

Verkoj de Josef Schiffer



- 1: **Mia Gramatiko 1 Esperanto**, 98p, 9,30 € Por germalingvanoj. 20 gramatikaj klarigoj.
- 2: **Mia Intensa Kurso 1 Esperanto**, 120p, 11,40 €. Por germalingvanoj. Lernado de Esperanto dum 20 tagoj.
- 3: **Mia Intensa Kurso 1 Traduko kaj libera parolado Esperanto**, 82p, 8,70 €.
- 4: **Mia Lernolibro Esperanto**, 132p, 11,40 € Por germalingvanoj. Lernado de Esperanto per 10 lecionoj.
- 5: **Mia Ŝlosiltruo Esperanto**, 52p, 0,75 €. Por germalingvanoj. Dek rigardoj tra la ŝlosiltruo por ekkoni esperanton.
- 6: **Mia lernolibro Esperanto** 26p kasedkjero, 3,30 € Akompanas la kasedon de la ĉi-supra kurso.
- 7: **Mia kantarono 1 Esperanto**, kasedo, 8,40 €.
- 8: **Mia lernolibro CD**, 8,40 € Akompanas la ĉi-supran kurson.
- 9: **Mia lernolibro** kasedo, 7,20 € Akompanas la ĉi-supran kurson.

MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

-
-
-
-
-
-
-
-
-
-

S-ro/ino

En

la

Subskribo:



BELSONA VORTO

Tiun someron la verkisto restadis en vogeza resaniĝejo kiu prizorgas flegadon, trejnadon, dietan manĝaĵon. La malsanuloj televidas, kafejiras, promenadas. Malmultaj legas. Tamen

Agrablis en suna parto de granda parko. Somera ardeco iel indulgis la herbaĵojn kaj arboj malŝparis grandajn makulojn de ombro. Marŝis mi decideme sur vojeto ŝtonere kovrita. Ĝi laŭiris altan kradaron kiu ampleksas herbejan spacon. Senstreĉa aro da damaoj kun inoj kaj idoj kuŝis ene pretervidantaj la pasantojn.

Multis marŝantoj ronde de tiu spaco.

Norde videblis majesta domo, hotelsimila : estis la resaniĝejo por kormalsanuloj kaj operaciitaj personoj kiuj serĉadas novajn fortojn. Ofta, regula marŝado plejtaŭgas por revigliĝi la kormuskolojn kaj retrovi pli firman spiron : ĉiu resaniĝemulo trejnadas obstine.

Nun mi sekvis devojiĝon. Kelkaj ŝtupoj. Jen ĉarna loketo ĉirkaŭata de arboj, natura ĉelo kun benko en la mezo. Sidis viro sur la benko malstreĉante siajn krurojn. Leginta. Li salutis min pretermarŝantan. Redonis mi la saluton etvoĉe.



La kuracprogramo postulas duan rondiron. Tiel okazis dua renkonto kun tiu leganto sur la benko. Li resalutis. « Bonan tagon, diris mi ekhaltante. Mi ne petas vin prezenti vian legaĵon, sed ĉu vi jus legis belsonan vorton kiun mi transprenu kaj 'maĉos' dum mia plua marŝado ? »

La leganto flankenmetis la libron, ridetis al mi kaj klarigis : « Oni donacis al mi tiun romanon. Plaĉa literaturaĵo. Temas pri la vivo de soleca virino kun infano en Jerusalemo... » « Jerusalemo, tranĉis mi. Taŭgas la vorto por longa remaĉado. Saluton. » Plumarŝis mi laŭ konsilita ritmo, dum mia spirito vagadis je la vorto 'Jerusalemo'.

Sekvantan tagon, jen mi denove sur la vojeto ŝtonere kovrita, laŭlonge de la kradaro kiu kaptotenas damaojn. La natura ĉelo viciĝis en la vojiro kaj la hieraŭa legemulo tie ĉeestis.

Mi salutis lin kaj demandis : « Ĉu viaj okuloj renkontis belsonan vorton sur la ĵus legata paĝo ? » Respondis la leginto : « Hodiaŭ mi legas rakonton pri la caro Petro la Granda. Estas nekredebla afero. Jen ĉiopotenculo kiu decidis modernigi sian landon, perforte. Plejhumanista sinteno kruciĝas kun mezepoka krueleco. La caro konstruigis imponan urbon en plej malracian terenon, en marĉon. Tiu frenezaĵo sukcesis. Oni diras ke Sankt-Peterburgo estas urbo kun specifa luma etoso. » « Sankt-Peterburgo estas elvokiva vorto, aldonis mi. Mi kaptas ĝin por akompani min dum plumarŝado. »

Sed la leginto haltigis min dirante : « Ĉu ankaŭ vi ŝatas legi ? »

- Jes. Kiam mi ne trejnadas, mi legas aŭ skribas. France kaj esperante.
- Ĉu vi ĵus parolis pri Esperanto, miregis li ?
- Mi praktikas Esperanton. Instruas ĝin.
- Nekredebla malkovro ! Mi ja scias ion pri tiu lingvo. Estinta. Ĉu ĝi vere praktikeblas, daŭrigis li kun dubema, insista rigardo ?
- Ĝi uzatas en ĉiutaga vivo. Ekzemple kun mia edzino ...

Kaj jen demandoj alfluis. Kio pri la gramatiko ? Ĉu deklinacio ? Kio pri vortfarado ? Ĉu uzata en kunvenoj ? Interrete ? (La sinjoro ĉeestis foje internaciajn kunvenojn ; li spertis malfacilajojn okazintajn dum redaktado de komunaj protokoloj).

Liaj demandoj interpuŝigis sin. Li ne volis longajn respondojn, sed rapide satigi sian scivolemon pri 'eksterordinaraĵo'. Mi atendis la kutiman, neeviteblan demandon : kiom da esperanto-parolantoj ? Vane.

Nur la fenomeno 'Esperanto' interesis lin.

Belsonis la vorto por li.

(Armand Hubert)

Christian Decklerk, en Tarokoj kaj Epokoj, rememoras kelkajn aforismojn :

- Entuziasmo estas la fuelo de l'sukceso.
- Ĉi tiu tago estas la unua tago de via plua vivo.
- Mi havu la forton ŝanĝi tion, kio ŝanĝendas ; la kuraĝon akcepti tion, kio ne ŝanĝeblas ; kaj la saĝon koni la diferencon inter ambaŭ.
- Malvolonto faras facilajn aferojn penigaj ; sindediĉo faras ilin ank pli feliĉaj.



La japana lingvo kaj ties skribo per komputilo.

Ginette Martin esploris pri la manieroj kiel japanoj sukcesas skribi sian lingvon per komputilo. Ŝi multe informiĝis ĉe sia amikino Ricko renkontita en Gotenburgo. Jen ŝiaj klarigoj:

Delonge mi demandas min, kiel la japanoj elturniĝas en tajpado sur klavaro de komputilo, sciante, ke pli ol 2000 japanaj signoj estas uzataj en la japana vivo. Mi supozas, ke la komplika situacio de la japanoj fontas de la fakto, ke ili uzas tri sistemojn de skribado, sed nun mi eksciis, ke sufiĉas 46 bazaj skribaj silaboj sur komputilo.

Demando de Ginette al Ricko:

Ricko, kiel vi faras per via komputilo?

Ricko respondas: "Se mi volas la silabon "ba" mi tajpas la latinajn literojn "B" kaj "A" kaj la komputilo tuj aperigas la japanan literon (en Hiragana) por "ba", sed mi devas antaŭe selekti kiun "alfabeton" mi deziras. Troviĝas listo, en kiu mi povas selekti "Latin-literoj al Hiragana"-ojn, "Latinliteroj al Katakana"-ojn aŭ "nur latinliteroj" antaŭ ektajpado. Se mi elektis "Hiragana" en la listo, la ekrano montras "Hiragana-ojn", kaj post la puŝo de klavo speciala por ŝanĝi al "Kanĵi-sistemo", la "Hiragana-oj" ŝanĝiĝas al "Kanĵi-oj". Se mi plu puŝas ĝin, aperas sur la ekranon listo de "Kanĵi"-oj, kies fonetiko estas "ba". Mi povas selekti konvenan "Kanĵi-on" el la listo.

Komentoj de Ginette:

Ricko havas similan komputilon kiel



eŭropanoj, ĝi estas kun latinaj leteroj en la aranĝo QWERTY, kaj ŝi uzas ĝin klavumante la latinajn literojn. Ekzemple, se ŝi volas iun japanan signon, kiu prononciĝas mo, ŝi tajpas "M" kaj "O", kaj tuj la komputilo produktas la japanan signon por "mo". Se ŝi volas "ki", ŝi tajpas "K" kaj "I", kaj tuj la komputilo produktas la japanan signon por "ki". Per tiaj kombinoj, kiuj estas antaŭpreparitaj en la memoro de la aparato, per malgranda nombro de klavoj, ŝi povas produkti ĉiujn fonetikajn literojn de la japana lingvo. Per tiu sistemo, kombinante "konsonanto+ vokalo", aŭ "konsonanto+ vokalo + vokalo" aŭ alia, oni eĉ ne bezonas ĉiujn 26 klavojn, por produkti ĉiujn eblajn fonetikajn silabojn de la parola lingvo.

La japana skribo:

Por skribi la japanan lingvon estas uzataj 3 japanaj alfabetoj aŭ pli bone 3 japanaj signaroj, 2 estas tute fonetikaj:

1. **Hiragana** estas fonetika silabaro kun 46 bazaj signoj + 25 kromaj signoj, (simile kiel e kaj é). Ĝi estas uzata kune kun Kanĵi kaj Katakana, por gramatikaj finaĵoj, prepozicioj kaj aliaj vortetoj.
2. **Katakana** estas paralela silabaro al Hiragana. Ĝi estas uzata por transkribi la fremdajn vortojn, ekzemple Parizo, (multajn geografiajn nomojn) Francio ktp, ankaŭ onomatopeojn, (vidu japanajn mangaojn).
3. **Kanĵi** estas ĉin-devena signaro kun nuntempe proksimume 2000 signoj rekomenditaj (tiu nombro daŭre evoluis kaj malmultiĝis en pasinteco).

Japanaj infanoj lerninte Hiragana-on povas kaj rajtas skribi tute fonetike tekston, kio tute ne estas taksata erara. Male al francaj infanoj, kies eventuala fonetika skribo estas konsiderata erara. Tial ofte japanaj infanoj ek de 3 aŭ 4 jaroj jam povas skribi la lingvon.

La edukado de la infanoj.

La infanoj ses-jaraj devas enkapigi dum la unua jaro de studado 71 Hiragana-ojn. Kaj poste dum ĉiu el la 5 sekvaj jaroj, ili devas enkapigi plie malpli ol 200 Kanĵi-ojn. Entute por la 6 unuaj lern-jaroj: 71 hiragana-ojn kaj 71 katakana-ojn (kiuj estas fonetikaj silabaj alfabetoj), kaj ĉirkaŭ 1000 kanĵi-ojn, kiuj estas ideogramoj. (kompreneblaj laŭ senco aŭ nocio), (kompareblaj al prononco de ciferoj kaj nombroj). Ĉiu kanĵi-o havas 1 ĝis 5 leg-manierojn (kelkfoje pli ol 5) En la mez-lernejo, novaj kanĵi-oj aldoniĝas.

Dua demando de Ginette: Ĉu via klavaro povas ankaŭ produkti rekte la hiragana-ojn (ankaŭ katakana-ojn kaj kanĵi-ojn) sen fari "B" kaj "A" ?

Respondo: Jes, estas la dua maniero. Antaŭ ektajpado mi povas selekti "rekte Hiragana"-sistemon aŭ "rekte Katakana"-sistemon. Se mi selektis "Hiragana"-sistemon, mi povas tajpi rekte "Hiragana"-ojn, senpere de tajpado de latinaj literoj, ĉar sur ĉiu klavo montriĝas "Hiragana"-o apud latina litero. Post la puŝo de ŝanĝ-klavo por "Kanĵi-sistemo", sur la ekrano aperas proponoj de vortoj en Kanĵi-oj aŭ Hiragana aŭ Katakana. Kanĵi-oj estas ideogramoj, nefonetikaj signoj, kiuj havas signifon.

Komentoj de Ginette: Per tiu alia metodo, se oni tajpas la hiragana-ojn (desegnitajn sur la klavoj), ili rekte aperas. En tiu kazo, necesas uzi 46 klavojn (Ne nur la 26 klavojn kun latinaj literoj). Kompreneble ekzemple per latinaj literoj, uzante 6 klavojn, R,K,N,A,I,O vi povas produkti 9 japanajn silabajn hiragana-ojn por ra,ri,ro, ka, ki,ko,na,ni,no. Per rektaj hiragana-oj vi devas uzi 9 klavojn por la 9 silaboj. Ankaŭ eblas aperigi en fenestreto proponojn de samfonetikaj vortoj skribitaj per Kanĵi, Katakana, aŭ eĉ latinaj literoj (por iuj bezonoj). Restas selekti la deziratan vorton.

Kelkaj demandoj de Ginette al Ricko: Mi legis en malnova libro, ke la japanoj skribas de dekstre maldekstren kaj de supre malsupren (do vertikale) tamen mi scias, ke la komputiloj laboras horizontale, kaj mi vidis Yukikon, kiu plenigis sian notlibron ankaŭ horizontale kaj de maldekstre dekstren, kiel ni. De kiam datas la ŝanĝo?

Ricko: Oni uzas ambaŭ skrib-metodojn vertikale kaj horizontale. Sed malmultiĝas dokumentoj, kiuj estas skribitaj vertikale, eble de post la dua mondo-milito. En lecionoj de japan-lingvo, lernolibroj estas skribitaj vertikale, instruistoj kaj lernantoj plej ofte skribas vertikale.

Por fini: Mi ankaŭ legis, ke la japanaj infanoj skribas sur kajeroj kun kvadrigita papero, la kvadratoj estas 1cm x 1cm, kaj unu japana signo devas esti en ĉiu kvadrato. (por eklerni la skribon).


Konkludo de Ginette. Se la japanoj uzus nur la fonetikajn silabajn alfabetojn hiragana aŭ (kaj) katakana, ilia vivo estus tre simpla, sed la ideogramoj "kanĵi", kiuj eble alimaniere kaj tradicie parolas al iliaj cerboj (kvazaŭ piktogramoj) restas tre uzataj kaj ŝatataj, do la studado estas longa. Komputiloj feliĉe ebligas la plej simplajn fonetikajn formojn, sed ankaŭ ebligas la plej riĉajn tradiciajn formojn.

Aldono de Andreo:

Jes, multaj libroj kaj gazetoj estas skribitaj vertikale kaj de dekstre al maldekstre. Tial la unua paĝo de la libro aperas kvazaŭ inverse kompare al la latin-literaj libroj. Sed eĉ en Francio la tradukitaj mangaoj (japanaj bildstrioj, origine vertikale skribitaj) havas la saman enpaĝigon. Tial la unua paĝo troviĝas kvazaŭ ĉe la fino.

Origine la japana lingvo estis skribita nur vertikale. Sed okazis evoluoj kaj tendencoj, nun ambaŭ manieroj estas uzataj, eble kun iaj preferoj laŭ la dokumentoj, afiŝoj, gazetoj, libroj, teknikaj libroj, personaj leteroj, retmesaĝoj. Tiarilate estas fakte multe pli da libereco.

Por skribi japane per franca komputilo eblas elŭti la senpagan programon MS IME 2000(japanese) ĉe: <http://www.microsoft.com/japan/office/ime/> kaj poste ĝin instali.



En la japana lingvo 3 alfabetoj estas mikse uzataj, jen en tiu simpla frazo ili ĉiuj aperas. La signifo estas: **Flugo de Frankfurto al Tokio kostas 1100 eŭrojn**



Ricko, Yukiko kaj Ginette en Gotenburgo

- | | |
|-----------------------------------|--|
| Ohayoo (gozaimasu) | Bonan tagon (matene) |
| Sayoonara , bai bai | Ĝis revido! |
| Arigatoo (gozaimasu) | Dankon ! |
| Doozo | Mi petas... |
| Kekkoo desu | OK, tre bone! |
| Moshi moshi | Allô ? (ĉe telefono) |
| Kanpai | Je via sano !... |
| | (neniam diri "ĉin ĉin", |
| | ĉar japanlingve tio elvokas ion seksan ! |

katakana

片仮名
(カタカナ)

- | | | |
|----|---|---|
| a | ア | 阿 |
| ka | カ | 加 |
| sa | サ | 散 |
| ta | タ | 多 |
| na | ナ | 奈 |
| ha | ハ | 八 |
| ma | マ | 万 |
| ya | ヤ | 也 |
| ra | ラ | 良 |
| wa | ワ | 和 |



Skribu al "Avo-Frosto" ("Jul-Avo"), li respondos ankaŭ en Esperanto !



MONTREALO, KEBEKIO, KANADO, la 18an de novembro 2003.

Kristnasko 2003 alvenas, kaj kiel ĉiu jare, miloj da infanoj el Kanado kaj el la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Tradicie en Kanado, infanoj, kiuj skribas al li en la franca, angla aŭ en dudeko da aliaj lingvoj ricevas respondon el la norda poluso ! Denove ĉi jare la geinfanoj, kiuj skribos al Avo Frosto ricevos respondon **en Esperanto** !...

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) traktis kun la Kanada Poŝta Servo sugestante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperanlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto estos inter la korespondaj lingvoj uzataj de Avo Frosto kaj siaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.

La Esperanto-Societo Kebekia invitas ĉiujn esperantistojn, junaj kaj junkoraj, malkovri tiun kristnaskan tradicion skribi al Avo Frosto.

Simple sendu manskribitan leteron (kun legebla adreso de la sendint-in-o por la respondo) al la sekva adreso:

Avo Frosto, Norda Poluso, Kanado/Canada HOH OHO ***

Ni ankaŭ invitas la esperantistojn kaj la esperantistajn organizojn tra la mondo varbi pri tio tiel ke la esperantlingvaj infanoj povos skribi al Avo Frosto ĉi jare.

Ni dankas antaŭe, se vi povus sendi al ni ekzempleron de revuo, kie la informo aperis :

Normand Fleury, Prezidanto de la Esperanto-Societo Kebekia
6358, rue de Bordeaux, Montrealo, Kebekio, Kanado, H2G 2R8

*** P.S. Jes ja, la adreso validas !... La speciala poŝtkodo HOH OHO estas rezervita al Avo Frosto, ĉar estas ja konata afero, ke li ofte forte gorgo ridas al la infanoj

Résumé :

Le Père Noël parle aussi l'espéranto !...

Depuis l'an dernier, le Père Noël canadien répond aux enfants du monde entier dans plus de 20 langues dont l'espéranto. Plus de 15 000 bénévoles à travers le Canada donnent un coup de main au personnage célèbre qui reçoit des milliers de lettres des 4 coins du monde. La Société Québécoise d'Espéranto est heureuse que la Société Canadienne des Postes ait accepté pour une 2ème année de répondre dans cette langue. Les lettres doivent être écrites à la main et comprendre une adresse de retour naturellement lisible.

L'adresse en français est: **Père Noël, Pôle Nord, Canada HOH OHO,**

et en espéranto: **Avo Frosto, Norda Poluso, Kanado/Canada HOH OHO**



...plomatique en espéranto... Le Monde Diplomatique en espéranto... Le Monde Diplomatique en espéranto... Le Monde di...

Ni senpermeso ŝtelas tekston de mesaĝo sendita siatempe al la UK de Gotenburgo... Multaj el niaj legantoj ja ne scias, ke "**Le Monde Diplomatique**" havas retan eldonon... en Esperanto ! Cetere pluraj francaj samideanoj estas membroj de la skipo de tradukantoj de artikoloj de la fama franca monatgazeto... (redaktorejo de "La Informilo")

Estimataj... (legantoj de "La Informilo" !...),

*... Mi havas la plezuron saluti vin nome de "**Le monde Diplomatique en Esperanto**" ...*

[... ..] Ni prezentas artikolojn de politika analizo pri mondaj kaj regionaj evoluoj kaj eventoj, kaj oni devas en nia epoko bedaŭrinde aldoni, ke temas pri honestaj analizoj, kiuj ne perfidas la interesojn de la grandega plimulto de la homaro – io sufiĉe rara en situacio, kie invadas niajn cerbojn senĉese misinformoj, tordajoj de la vero kaj eĉ rektaj mensogoj.

*Ni petas vin do viziti nian teksejon <http://eo.monedediplo.com> kaj legi aŭ deŝuti la artikolojn, kiuj interesas vin, cetere senpage (male al aliaj eldonoj de "**Le Monde Diplomatique**"), ĉar nia skipo laboras libervole.*

Amike... "



*Vilhelmo Lutermano
(respondeculo pri LMDE)*

Historio de la esplorado

La Skryjsko-Týřoo-kambrio apartenas al klasikaj teritorioj de monda paleontologio. La plej malnovaj literaturaj mencioj pri kolekto de ĉi-lokaj fosilioj estas al 1832, kiam ĉi-tie kolektadis la patrujama pastro V. KROLMUS. La sekvan jaron ĉi-tien venis J. BARRANDE, al kiu apartenas la primareco en la priskribo de trilobuloj el la Skryje-teritorio. La antaŭtempa raporton li aperigis en 1846. Jam unu jaron poste li aperigis ampleksan raporton pri la mezĉeĥaj trilobuloj: I. HAWLE kaj A.J.C. CORDA.

En 1852 J. BARRANDE aperigis unuan parton de sia monumenta verkaĵo "Système silurien du centre de la Bohême", kiu estas dediĉita al la trilobuloj kaj ĝi kune kun la aldonaĵoj el 1872 estas ĝis hodiaŭ la plej ampleksa kaj la plej kompleta monografia verkaĵo pri ĉeĥaj trilobuloj. Tiu ĉi esploristo aperigis ankaŭ dekojn da pluaĵ ellaboraĵoj, en kiuj krom aliaj estas dediĉita la atento al la problematiko de Skryje-Týřoo-kambrio.



J. Barrande

La geologiaj kaj paleontologiaj esploroj daŭrigis kun granda intenseco eĉ post la dua mondmilito.

JOACHIM BARRANDE

Li naskiĝis la 11.8.1799 en bieno proksime de urbeto Sagues en Suda Francio, en familio de malnov-hispana nobelara deveno. Pri lia infanaĝo ni havas neniam raportojn. En jaroj 1819-1824 li studis en Parizo inĝenierajn kaj natursciencojn.

Barrande estis tre inteligenta kaj verŝimile li sciis konvene kondukti en la societo. La sciigoj pri liaj profundaj scikonoj el la plej diversaj sciencaj fakoj trovis vojon ĝis al la reĝa kortego. Kaj sekve de tio la juna inĝeniero fine de 20-aj jaroj fariĝis instruisto kaj edukanto de la nevo de franca reĝo Karolo X-a -Henriko, grafo el CHAMBORD, kiu devis fariĝi la sekvanto de la trono.


Antaŭ la juna polihistoristo desegnadis sin promesplena kortega kariero. Sed ĝin neniigis la julia revolucio en 1830, ĉe kiu estis la reĝo kun sia kortego el Francio elpelita. Barrande akompanis la reĝan kortegon unue al skotlando kaj pli poste en Ĉeĥion, kie la franca eksreĝo akiris en 1832 la rifuĝejon en Praga kastelo. Dum la tuta tempo Barrande plue plenumadis sian funkcion de edukanto kaj ligis firman amikecon kun Henriko el Chambord.

En 1833 Barrande subite finigis sian edukan funkcion. Verŝimile kaŭzis tion la kortegaj intrigoj, pli proksimajn informojn ni ne havas. En tiu tempo Barrande jam ligis kontaktojn kun ĉeĥaj sciencistoj kaj je iliaj instigoj li revenis al sia orgina profesio - inĝeniereco. Pere de la grafo KAŠPAR ŠTERNBERG li estis komisiita projekti kaj mezuradi la vojdirektigon de ĉevalvagonaro el Lány al RADNICE. Eĉ se tiu ĉi fervojo ne estis realigita, ĝi decidis definitive pri la plua vivo de Barrande.

Mezurante kaj ĉe la terenaj laboroj en la ĉirkaŭaĵo de SKRYJE Barrande trovis ja multnombrajn fosiliojn. En Parizo li vizitadis prelegojn de famekonataj naturosciencistoj - CUVIER, BRONGNIART kaj d'ORBIGNY, en Skotlando li konatiĝis kun R MURCHISON, en la tempo de restado je Praha kastelo li kolektadis la fosiliojn en ĉirkaŭaĵoj de hodiaŭa ZLÍČOV kaj BARRANDOV.

Trilobulo

La beleco de la fosilioj tiom ĉarmigis Barrande-on, ke li al ili dediĉis sian tutan vivon. Pli poste, kiam li fariĝis ĝenerala administranto de la bienoj de Chambord, lia bona financa situacio al li permesis dediĉi sin al



sia hobia kaj tial li povis de la ministoj aĉetadi la fosiliojn. Kelkaj el ili per tiu ĉi celo laborigadis.

La rezultojn de sia esplorado – dum 44 jaroj – li deponis en multajn scienc-ellaboraĵojn, "Système silurien du centre de la Bohême". Ĝi enhavas 22 volumojn, pli ol 6000 paĝojn kaj 1160 tabelojn.

Pere de la verkaĵo de Barrande la tuta mondo konatiĝis pri nekutima riĉeco de fosilioj, kiujn la ĉeĥa lando posedas. La formika laboro de Barrande pruvis, ke la primaraj enmetaĵoj en la meza Bohemio apartenas al la plej riĉaj teritorioj de la tuta mondo el vidpunkto de la fosilioj.

Bohemio – Ĉeĥio fariĝis klasika teritorio, unu el bazaj teritorioj por ekono de la leĝoformeco de evoluo sur la terglobo.

La sekvantoj de Barrande pritaksis la meritojn de sia instruisto. La strioj de minaĵoj tiriĝanta ekde UVALY trans Prago ĝis al KLATOVY, kiu estas restaĵo de vasta malnovmonta kaj primara mara baseno, estis nomita je lia honoro BARRANDOV. En Prago "Ha njezdě" estas lokita bronza tabulo kaj lia busto, la busto de Barrande.

Trad. Jací

Destinoj de famaj virinoj (el Spirit)



En la unuaj semajnoj de sia restado sur Sankta Heleno Napoleono loĝis en bela ĝardeno domo nomata "Roza barilo", kies posedanto estis komercisto kaj gastejmastro BALCOMBE. Tiu havis kelke da geinfanoj, el kiu la imperiestron ekinteresis la antaŭtempe maturiĝinta 14-jara BETSY. Ŝi estis ŝercema ĝojplena knabino kaj parolis erare franclingve. BETSY incitadis la jaluzon de Napoleono per eta flirtado kun oficiroj el lia ĉirkaŭaĵo. Al Napoleono ŝajnis, ke BETSY plej bone fartos ĉe la



marŝalino Bertrand, al kiu oni ordonis prizorgi ŝian edukon. Ĉi-tie li ŝin ofte vizitadis kaj iomete forgesadis sian tristan situacion, kiam li kun Betsy ludis kartojn aŭ bilardon aŭ kiam ŝi al li per la malbona franca lingvo laŭtleĝis.

En 1818 devis la familio BALCOMBE forlasi S-tan Helenon. BETSY terure malbone elportadis la disigon de sia granda amiko. Napoleono mortis 3 jarojn poste.

Betsy ricevis de Napoleono III-a la bienon en Alĝerio kiel dankesprimon por tio, ke al la mizera elpelito sur la izolita insulo ŝi donacis ankoraŭ kelke da momentoj de mallonga feliĉo.

bildoj – maldekstre Betsy - dekstre: Napoleono babilas kun Betsy kaj fratino

Komenco de la kartografio



En la 18a jarcento la astronomoj de kvar generacioj de familio CASSINI sukcese estris la unuan tutŝtatan fakon kartografion de Francio kaj kreis mapon LA CARTE DE CASSINI. Francio estis la unua lando, kiu komencis uzadi sciencan fakon nomatan kartografio. La plua estis Britio, poste Aŭstrio kaj Germanio. En la unuaj 10 jaroj de la 19a jarcento la tutŝtata mapigo disvastiĝis ankaŭ en aliaj landoj de Eŭropo. En 1817 komenciĝis signifoplena trigonometria mezurado, kies celo



estis mapigi la tutan Hindion. Tiun ĉi mezuradon estris George EVEREST, post kiu lian nomon akiris la plej alta monto de la mondo.

trad. Jaci

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2003. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2004 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2004 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT.

1. Association Régionale ESPÉRANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** (n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse.
Ex. Abono Informilo + kotizo 2004 por 755)
- par chèque bancaire à l'ordre de **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY**, mais adressé à notre trésorier: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse.

Abonnement et cotisation pour les années:	2004	2005	2006
Abonnement simple à La INFORMILO adresse en France	12 €	12 €	12 €
adresse à l'étranger	16 €	16 €	16 €
Adhésion simple à l'Association Esperanto France-Est			
• Membre fédéral avec abonnement à La INFORMILO	17,70 €	18 €	18,30 €
• Membre fédéral sans abonnement à La INFORMILO , pour les autres membres de la famille par exemple.	5,70 €	6 €	6,30 €

2. Associations Nationale et Internationale (cotisations 2004)

Les cotisations à l'UFE et à l'UEA sont à payer directement à **UFE**, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP:85535D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2003 de l'UFE. Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.

Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.

Adhésion à l'Association Régionale et à l'U.F.E.	
• Membre actif UFE complet avec la revue de l'UFE, Le Monde de l'Espéranto + Okazas	55 €
Tarif réduit pour étudiant et chômeurs	35 €
• Membre actif non abonné (reçoit le bulletin d'information Okazas)	33 €
Tarif réduit pour étudiant et chômeurs	20 €
• Membre actif UFE conjoint	30 €
Adhésion à l'Association Régionale et à l'U.F.E. et à JEFO (moins de 30 ans au 1.1.2004)	
• Membre actif JEFO+UFE (reçoit JeunEspéranto info, koncize et Le Monde de l'Espéranto)	55 €
• Membre actif JEFO +UFE étudiant, chômeur, scolaire (reçoit idem)	35 €
• Membre actif JEFO salarié (reçoit JeunEspéranto info et Koncize)	30 €
• Membre actif JEFO étudiant, chômeur, scolaire, appelé (reçoit JeunEspéranto info et Koncize)	15 €
Adhésion à l'Association Universelle d'Espéranto (UEA)	
• Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	+ 9 €
• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	+ 22 €
• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	+ 54 €

IMPORTANT

- 1) Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale **ESPERANTO FRANCE-EST**, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association. Les nouveaux adhérents à l'UFE ou à l'UEA, recevront leur carte de membre directement de ces associations.
- 2) Les autres membres trouveront dans le bulletin La Informilo, qui suit l'enregistrement de leurs cotisations, les coupons de l'année 2004 ou même 2005, à coller sur les cartes de membre respectives. Les membres de l'UEA y trouveront également les coupons 2004 donnant droit au service des délégués mondiaux dont les adresses se trouvent dans l'annuaire de l'UEA.
- 3) Les membres de l'Enseignement, payant leur cotisation de l'UFE, sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au **GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (GEE)**
- 4) Les jeunes de moins de 30 ans au 01.01.2004 (qui auront bien mentionné leur date de naissance), payant leur cotisation de JEFO recevront la revue JeunEspéranto Info (France) et KONCIZE (Europe). Ils auront droit de vote à l'AG de JEFO et des tarifs privilégiés aux rencontres de JEFO, au **Pasporta Servo** et des réductions sur **la JEFO'butik**. Les moins de 30 ans adhérent à l'UFE seront automatiquement membres de JEFO et bénéficieront donc des mêmes conditions.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2004 ĝis 2006

La numero 124 de **La Informilo**, kiun vi nun ricevis, estas la lasta de la abon-periodo 2003. Alvenis la momento renovigi vian jar-abonon por 2004. Bonvolu trovi ĉi-poste la novajn tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Se vi jam pagis vian abonon por 2004 tiam aperas sur la unua linio de via adres-etikedo la mencio "2004 A". Se ne, vi bonvolu tre baldaŭ pagi vian abonon kaj kotizon laŭ la ĉi-subaj tarifoj. Ni antaŭdankas vin pro via akurateco.

JAROJ:	2004	2005	2006
Abonoj por adresoj en Francio:	12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abonoj por adresoj ekster Francio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:	5,70 eŭroj	6 eŭroj	6,30 eŭroj

Vi povas pagi la koncernan sumon:

1. **Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:**
 ESPERANTO FRANCE-EST poŝtĉekkonto 1997 72W NANCY
 Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.
 La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:
 ekzemple: abono Informilo + kotizo 2004 por 225
2. **Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY**
sendita al jena adreso:
 S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio
 Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, al Inter Ni, kotizo, disko, donaco al ktp
 por 2004, 2005 ktp
 Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.
3. **Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA**
 Ludwigshafen, je la nomo de: **Hans-Dieter Platz**. (menciu la celon de via pago)
4. **Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY**
 (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)

Ni petas vian abonon al

INTER NI

La revuo
el Malagasio

por la jaro 2004

**KUNLIGAS
LA NORDON KAJ LA SUDON**


servo universala
UKS
kultura

Tiel vi daŭre ricevos ankaŭ la
venontajn numerojn.

Subtena abono: 18 € Simpla abono 14 €

Inter Ni estas 4-monata revuo de **Malagasio**. Per via abono vi subtenas la Esperanto-movadon en tiu afrika lando. La abono estas pagebla al nia kasisto laŭ la ĉi-suba tarifo. Fruaj pagantoj ricevos la lastan numeron de 2003. Prov-ekzemplero je via dispono.

Inter Ni	Tarifoj por 2004
Subtena abono	18 €
Simpla abono	14 €
Abono en nepagi-povaj landoj	10 €



S-ro BRISOU D Gérard
chemin du Roasson
73410 LA BIOLLE

... "Je vous joins un chèque de 12 € pour le renouvellement de mon abonnement à LA INFORMILO et vous adresse toutes mes félicitations pour cet excellent journal"

dank'al

Philippe GOCKER, vinkulturisto kaj diplomita enologo, kiu proponas por viaj festoj kvar famajn alzacajn vinojn etikeditajn en Esperanto !

Philippe Gocker, viticulteur et oenologue confirmé vous propose pour vos fêtes quatre vins renommés étiquetés en Esperanto !

VIN D'ALSACE

APPELLATION ALSACE CONTRÔLÉE

ALZACA VINO

KVALITIKONTROLITA VINO

MIS EN BOUTEILLE
EN MITTELWIHRA LA PROPRIÉTÉ
DE LA VIGNA*Gewurztraminer*

13% vol.

750 ml

PHILIPPE GOCKER - PROPRIÉTAIRE A FARMER MITTELWIHR FRANCE
PRODUCT OF FRANCE - FRANCE - TEL. 89 49 01 23**TRADICIO ... KOMPETENTO ... KVALITO**

Tradition ... Compétence ... Qualité ...

De 1568 la familio GOCKER pasie prizorgas siajn vitojn (7 hektaroj) kaj amece bredas siajn vinojn ...

Depuis 1568 la famille GOCKER soigne avec passion ses vignes (7 hectares) et élève ses vins avec amour ...

***** CRÉMANT D'ALSACE "DIAMANT"**

8,35 eŭroj 54,77 FRF

***** SYLVANER 2002**

5,20 eŭroj 34,11 FF

***** RIESLING 2002**

6,60 eŭroj 43,29 FRF

***** GEWURZTRAMINER 2002**

6,90 eŭroj 45,26 FRF

Vizito komentata de la vinkelo,

Vendado surloka kaj laŭ mendoj.

Visite de cave commentée, vente sur place ou sur commande.

Surloka vendado : prefere post la 18-a horo.

PHILIPPE GOCKER

1, Place des cigognes

FR - 68630 MITTELWIHR

Tel : +33 (0)3 89 49 01 23

Fakso : +33 (0)3 89 49 04 72

rete : philippe.gocker@wanadoo.fr

Pô k : 16 99 05 P STRASBOURG

Tout abus d'alcool nuit à la santé - Troa alkoholo malsanigas !

MENILO

JES, mi mendas botelojn de ALZACA VINO kun Esperanto-etikedo.***

OUI, je commande bouteilles de vin d'Alsace étiquetées en Esperanto. ***

..... botelojn/ bouteilles de **CREMANT D'ALSACE** je 8,35 eŭroj 54,77 FRF..... botelojn/ bouteilles de **SYLVANER 2002** je 5,20 eŭroj 34,11 FRF..... botelojn/ bouteilles de **RIESLING 2002** je 6,60 eŭroj 43,29 FRF..... botelojn/ bouteilles de **GEWURZTRAMINER 2002** je 6,90 eŭroj 45,26 FRF

Ĉi-kune ĉeko de eŭroj / Ci-joint un chèque de euros

Liverota adresol/ adresse de livraison #:

NOMO/ Nom:

(en presliteroj/en lettres d'imprimerie)

Adreso :

.....

.....

Dato :

Subskribo/signature :

*** Prezoj kun afranko kaj AVI entenataj por minimuma mendo de 24 sortimentitaj boteloj (nur ene de Francio)*** Franco de port & TTC pour livraison minimale de 24 bouteilles assorties (uniquement pour la France)

Por sendo eksterlanden, bonvolu antaŭe konsulti TAKE pri la ekspedo-tarifo.

pour expédition à l'étranger, veuillez contacter TAKE pour connaître le montant des frais d'expédition.

* Prezoj validaj ĝis fine de septembro 2003.

* Prix valables jusqu'à fin septembre 2003.

NI PROVU ... RIDETI !



... pri deveno de la nomoj de la Indianoj ...

Eta indiana knabeto pridemandas sian patron: "Paĉjo, kial ni, Indianoj, ricevas tre longajn nomojn, dum kaŭboj surhavas malgrandajn nomojn kiel *Bill, Tex, Sam*? ...



-Nu, respondas la patro, ĉar ni vivas sine de la Naturo, kaj sekve ni konservas ian poezion, male al tiuj Blankuloj en la urboj, kiuj ĉion perdis. Vidu, cia eta fratino nomiĝas "*eta-argenta-humradio-speguliganta-en-flagretanta-lago*". Ŝi ja naskiĝis dum stelplena nokto, je printempa krepusko... Pro tio ankaŭ la luno speguligis sur la surfaco de vasta lago ĉirkaŭata de altaj arboj... Vere mirinda estis la pejzaĝo... Ni feliĉis, cia patrino kaj mi, tial ni deziris konservi por ĉiam en memoro tiun eksterordinaran momenton... Pri cia frato, tute samas... Li nomiĝas "*majesta-supermontara-fluganta-ebenkolora-aglo*", ĉar li naskiĝis meze de belega somero, sur granda herbejo ĉirkaŭata de neĝkovritaj montoj, super kiuj ŝvebis per preskaŭ senmovaj flugiloj, giganta aglo tre certe serĉanta sian rabaĵon... Temis pri grandioza kaj majesta spektaklo... Ni deziris ankaŭ tiun vesperon enmemorigi... Jen, tio estas simpla, ĉu ne? ...



...Hm, hem... ĉu ci volas starigi aliajn demandojn, "*eta-truplena-ŝirita-kondomo*"? ...



Profitante ĉeeston ĉe la kombisto, la kliento petas la fakulon forigon de la lipharoj... Rehejmigante, li malfermas la pordon kaj subite lia edzino ĉirkaŭbrakumas lin plej tenere kun dediĉo de longa kisado, okuloj fermitaj... Tute plezurigita de la evento, la edzo, kiu neniam spertis tian akcepton, dolĉe sufloras en ŝian kolon:

"Nu, karulino mia, bonan ideon mi havis fortranĉigi miajn lipharojn! ...

- Dio mia, ekkrias la paliĝanta edzino, kiu subite retropaŝas... *mi ne rekonis cin!*"



Vere feliĉa, instruistino alparolas sian lernantaron:

"Kiel vi jam scias, mi tre baldaŭ edziniĝos... kaj cikonio alportos al mi beletan bubon. Mi invitos vin ĉiujn poste kaj ni frandos bongustan kukon... Johano, pri kio temas tiu susurado, tie?...
- Hm, Fraŭlino, mi diris al mia amiko, ke se vi tre baldaŭ edziniĝos, estus certe oportune informi vin, pri la aludita cikonio..."



Ŝi supreniras pesilon kaj ekkrias:

„Dio mia!... Mi estas tro malgranda!

La edzo:

„Ci eraras! Ci volis diri... mi estas tro dika! ...

- Tute ne! Laŭ normoj, virino 1,68 metron granda devas pezi 60 kilogramojn!

- Ĉu?... mi ne komprenas...

- Nu, mankas al mi 8 centimetroj!"



Tago de ekzamenoj en universitato. Tre bela studentino eniras, movante volupteme sian kokson... Ŝi sidiĝas, okulumas oblikve al la relative juna ekzamenanto, suprentiras sian jupeton sur la femurojn, iom larĝigas la dekoltaĵon, kiu duonliberigas belforman bruston...

La profesoro komencas pridemandi ŝin... sed malfacile. La belulino daŭre alridetas ĉarme...

"Nu, fraŭlino... Kion vi deziras? Pluajn demandojn pri la programo aŭ... rendezuon?"

Ŝi iomete ruĝiĝas kaj murmuris:

- Hm... Mi preferus rendezuon...

- Nenia problemo... Venontjare, je la sama ekzamen-periodo... Ĉu bone? ..."

Tio okazas en kafejo. Iu viro, membro de Asocio kontraŭ Alkoholismo, provas persvadi iun drinkulon ĉesigi ebriiĝi...

Sed vane, la jam ŝanceliĝanta viro tute ne deziras forigi sian emon... Finfine la sobrulo avertas:

"Eksciu, ke alkoholaĵoj mortigas ĉiujare pli ol 100 000 Francojn! ...
- Glup! Glup!... min tio ne interesas... Bel.. Belgo mi 'stas! "




Iu studento promenas rande de la universitato... Unu alproksimiĝas biciklante... La unua fajfas...


"Mirinde, kie ci aĉetis tiom belan biciklon?"

- Nu, fakte, hieraŭ mi kviete piediris... kiam subite preterbiciklis superba ulino, kiu haltis, demetas la biciklon teren, sin senvestigas... tute... kaj proponas... Prenu ĉion, kion ci deziras! ...


Post iom da pripenso, mi elektis la biciklon..."

La alia studento:
"Ci prave agis... Ŝiaj vestaĵoj estintus tro mallarĝaj por ci!"





DISTRANGULO



Silab-enigmo ★

- | | | |
|----|-------------------|-------------------------|
| 1 | + - - + - - | jukiga planto |
| 2 | + - - + - - - | elstara, ronda modluro |
| 3 | + - - + - - | li ne vivas sur kamparo |
| 4 | + - - + - - | plenkreskulo |
| 5 | + - - + | eta ronĝulo |
| 6 | + - - + - | filo de Dedalo |
| 7 | + - - + - - | dika sandviĉo |
| 8 | + - - + - - - | pelto de didelfo |
| 9 | + - - + - - | nordafrika ŝtato |
| 10 | + - - + - | oficiala nuliga akto |
| 11 | + - - + - | baldaŭ 25 en Eŭropo |
| 12 | + - - + - - - - - | higiena doktrino |
| 13 | + - - + - - | vundi dignecon |
| 14 | + - - + - - | itala urbo |
| 15 | + - - + - - - - | simileco kun la praavoj |
| 16 | + - - + - - | florfolio |
| 17 | + - - + - | tie oni luas ion |



“Do, vi feritempis en Aŭstralio ?
- Jes, kaj mi trejniis bumerangon !”



Kosmonaŭto revenas surteren post longa periodo. Tuj post kiam li eliras el la raket-kabino, lia edzino impetas por plej tenere stringi lin... sed subite demandas: “Sed, kio estas tiu verda kapharo sur cia ŝultro?”



“Mia edzino atendas infanon...
- Hm... Kiun vi suspektas ?”



Helpe de la sube alfabete ordigitaj vort-eroj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donos proverbon de Zamenhof.

ab ad aro at av ba ba bo di ejo en ik is ke ko ko la lo lu ma mo mu ndo ner no no of o lolo o
as pe ris ro ro ro ros o ta ti to tu umo ur ur ve va

jarfina konkurso

Du el la solvint(in)oj de la du enigmoj (sendo antaŭ fine de februaro, al la adreso de la redakto) estos lote elektitaj. Libron ili ricevos rekompence por ilia plezuriga cerbumado...

Stvbrnz ★

Sub tiu kodigita teksteto kuŝas aserto de Herodoto, en kiu ĉiuj literoj estas anstataŭigitaj per aliaj. Ekzemple, ĉiuj a estas fakte i, kaj ĉiuj z estas fakte o.

bsbar sĵocĵ jksbsĥc fzk fksjska hamaozb cm fcpz ;
vrh fcpc fskazvz, jamzn sbozhraecĵ ĵacnb fcokznb ;
vrh hamaoc fskazvz, fcokzn sbozhraecĵ ĵacnb jamznb.



Solvoj de la lastaj enigmoj – N° 123

- 1/ silab-enigmo : *rostita kolombeto ne flugas al buŝeto*
- 2/ mistera krado: *bona vingustumisto rekonas la originan landon je la unua sorbo, la grundon je la dua kaj la jaron je la tria*